

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Protaktantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa  
W.M. Page, advokato, Edinburĝo  
Ernest Archdeacon, Paris  
I. Gilli North, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank-kaj fabriko-  
direktoro, Kaunas.

**N-o 212**  
**5. 10. 1924**

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.  
Redaktoro: Robert Kreuz.  
Redakciaj kunlaborantoj:  
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro  
aŭ 0,20 sv. fr., por landoj, kies valuto  
aŭferas maksimume 50%; por ĉiuj aliaj  
landoj 0,08 dol. aŭ 0,25 sv. fr.

Anonprezo

po kvadrata-centimetra egalvaloro de  
0,30 sv. fr. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fr.),  
es „Internacia Komercio“ la duoblo.

**Antwerpen, Barcelona, București, Edinburĝo, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa**

### Enigma de l' Kremlo.

De J. Stellectyk.

Okaze de l' disputo pri la Biblioteko de Ivano la Terura.  
**Ĉe la fontoj de l' historio.**

En la unua duono de XII-a jarcento sur la ruinoj de iam estinta fortilo, sur la loko de nuna Kremlo, estis fondita terbeneto de boiaro Kučka kun dehaka termastrumado; por pluegi estis senarbigita loko en la regiono de Lubjansk-a placo, tiamaniere aperis plugebla „Kučkovo pole“. La bojara terbeneto trege plaĉis al suzdaĵa knjazj (=Princo) Jurij Doigorukij, komence gastio, kaj poste, de 1147 j., jam mastro de la ĉarma loko. Post dek jaroj, Jurij fondis ĉi tie veran rusan fortilon de pretempa tipo, kun barajo el pinaj, akrapintaj palisoj sur supro de la antikva remp-aro de la iama fortilo. La kroniko elokvente skizas trege reliefan bildon de la fondo de la urbeto, kiu poste sukcesis solvi favore por si disputon pri la loko de la mondrubo.

La pinaj muroj de Jurij bonege eltenadis la sieĝojn de malamiko, iŝerianoj<sup>1)</sup> kaj tataroj, preskaŭ du jarcentojn, ĝis ili estis anstataŭitaj per la kverkaj de zorgema mastro Iván Kalitja<sup>2)</sup> en 1352 j.

Kalitja turnis Kremlon fasade de sud-okcidento al oriento, ĉirkaŭinte Kremlon per kverkaj muroj. Sed jam baldaŭ, nur post tridek kvin jaroj, la kverkaj muroj iom post iom estis anstataŭitaj per ŝtonaj, ĝis ili ricevis la nunan aspekton, dum la regado de la kreinto de Moskva regno, energia Johano III<sup>3)</sup>. Unu el la konstruintoj de la muroj, Milanano Petro-Antonio Solari, restigis gravan daton de ilia konstruado en latina surskribo, tranĉita de li sur la Spas-a turo<sup>4)</sup> en 1491 j. La ŝtona barajo de Kremlo, longa je du kaj kvarono da verstoj, de nun fermiĝis por ĉiam. Estonte Kremlo povis kreski nur levigante ĉielen aŭ enfosiĝante en teren.

#### Subtera Kremlo.

Ne ekzistas en la mondo miljara urbo, kiu ne havus sub si ankoraŭ alian, subteran. Moskva, aparte Kremlo, ne estas escepto. Rolo de talpo plej taŭgis al de naskiĝo kaŝema kaj ĉiontempa caro Iván Groznij (Ivano la Teruro, 1553—1584).

Se antaŭe en teron sin enfosis urbano, sin savante de princaj malpacoj kaj tataroj, nun konstruante tien rampis la caro mem, kun siaj oprĉnikoj<sup>5)</sup>: sendanĝere estas, kaj pli oportune koncerne turmentojojn! Por interligo kun la turmentojoj en la subterejo de la domo de Maljuta Skuratov<sup>6)</sup> sur la Bersenevka<sup>7)</sup> estis trafosita el Kremlo speciala komunikvojo sub Moskva-reaka; alia vojo — sub Varvark-an turon, en Kitaj-gorod<sup>8)</sup>, la tria — sub marĉo, sur Moĥovaja-sirato, por komunikvojo kun la malnova domo, kie nun troviĝas Ekaterintempa domo de Paŝkov (muzeo de Rumjancev). Antaŭ ne longe estis trovita sekret-ejo sur Dmitrovka-sirato kun enkatenigitaj skeletoj. Plena da sortaĵoj kaj de mezepoka roman-tikeco estas la antikva subtera Moskvo, kun ĝia mistera Kremlo. Kaj, tamen, ĝis nun ĝi ne estas esplorita, estante senzorge traktata de la oficiala arĥeologio.

#### Mistera biblioteko.

Ivano — rusa caro — estis fenomeno en sia tempo.

Akrevida politikisto, mirinda amato-antikv-ajisto kaj bonega konanto de teologiaj libroj, li malsanis je persekutad-manio.

1) Rusaj narbaroj, batalintaj kun moskvanoj por ĉefado meze de la rusaj princlandoj.  
2) Johano Monio, konata kiel unuiginto (pro tio li estis nomita „monulo“) de rusaj apartigitaj terposedaĵoj sub potenco de la Moskva princlando. (Reg. 1328—1341).  
3) Moskva knjaz, unua sin nominta rusa caro. (Reg. 1462—1505).  
4) Turo super la ĉefa Kremla pordego.  
5) Caraj servistoj el nobelaro, elradikintaj faktan kaj ŝajnan per-fidon en la regno laŭ ordono de Groznij, akompanante ĉi flou per rabado kaj perforto.  
6) La plej amata de Groznij oprĉniko, konata pro sia malbon-agado.  
7) Sirato en Moskva.  
8) Parto de Moskva, senpere kontaktanta la orientan muron de Kremlo. La ĉi-parto ankaŭ estas ĉirkaŭita per muroj; parto de la lastaj estas Varvarka turo.

Malmulte estis por li havi nur ŝtonajn arkaĵojn, li bezonis sekretejojn en muroj (Novgoroda katedralo, Aleksandrovska-sloboda<sup>9)</sup>) kaj profundajn subterejojn (Kremlo). Ĝuste en neatengeblajn subterejojn de l' Kremlo li kaŝis sian mondinteresan kaj faman bibliotekon, je ok cent libroj. Komenco por la lasta estis grekaj manuskriptoj, alveturigitaj kiel doto al Johano III de greka caridino Sofia Paleolog.

La cara arĥivo konsiderinde pligrandigis dum la tempo de Basilo III<sup>10)</sup> kaj dum la regado de Johano IV farigis unika biblioteko. Terura caro, ŝparema, samkiel poste Petro I (la Granda; 1662—1725) ne estis avara por akirado de libraj unikajoj — grekaj, latinaj, hebreaj. Liaj agentoj dissenditaj estis en Eŭropo, turka Bizancio, kazaĥa Ukrainio. El ĉie venadis en malferan Moskvon malfortaj libroj, pri kiuj nuntempe ploras la kultura Eŭropo. La 1554-jaron, sekve, en la sepa jaro post la granda brulo, Ivano elveturigis el Ukrainio „Poltrejfadcaj“ — dudek kvin ekzemplerojn da mondumaj libroj el la ne malpli fama, subtera biblioteko de Jarosláv Mudrij<sup>11)</sup>. Por ili en Moskvon veturadis kievaj scienculoj; ne malpli granda allogilo ili estis ankaŭ por eŭropaj scienculoj. Kaj ĉiuj tiuj ĉi netakseblaj



Interesa bildo de l' Kremlo en Moskva.

libraj trezoroj estis kaŝitaj de Ivano en kremlaj sekretejoj. Mem ne estante klasikulo, la caro atendis okazon. Kaj okazo sendis Dorpat-an pastron, kleran germanon Wetterman. Fidante je lia klereco, Ivano ordonis malfirmi antaŭ li sian sekretan trezorejon, proponante traduki la librojn en rusan lingvon. Estis sep vinditoj de la plenkastaĵaj subterejoj: tri registaraj agentoj kaj kvar germanoj. Iliaj personoj, krom tiu de unu germano, estas konstatitaj historie. Traduko de l' libroj ne okazis, ĉar moskvaj oficistoj timis esti alstarigitaj al germanoj por senŝanĝa gardado. Kolerigita Ivano ordonis sigelfirmi sian trezorejon sub tri serurinoj. La tempo ĝin indulgis: de tiu momento ĝin ne tuŝis homa mano.

#### Serĉado kaj elfosado.

Tamen, la legendo pri la sekreta trezoro estis vivanta, kaj oni ne unu fojon komencis ĝin serĉi. Vane serĉadis ĝin poloj, ekposedinte Kremlon en komenco de l' 17 jarcento; ili trovis nenion, krom sola valora manuskripto, — privilegio de Konstantino por Papoj, donacita de poloj al Vatikano.

Sciavida caridino Sofio<sup>12)</sup> sendis por serĉado en kremlajn subterejojn konfidatan diak-on<sup>13)</sup> Makarjev. La lasta felice trairis subteran Kremlon de la Tajnick-a turo ĝis la Sobákin-a turo (Arsenala) kaj vidis arkajajn ĉambregojn, ĝis supro pleniĝitaj per kofroj. Sofio ordonis, ke li silentu pri la viditaĵo atendantie pli bonajn tempojn. Sed ŝia stelo antaŭtempe estingiĝis, kaj

9) Apudmoskva loĝloko, tre amita de Groznij.  
10) Filo de Johano III kaj patro de Johano IV Terura. (Reg. 1505—1533).  
11) Jarosláv la Saĝa, kiev knjaz de XI jarcento.  
12) Fratino de Petro la Granda, dum kies infaneco ŝi regadis (1682—1689).  
13) Oficisto en la antikva Moskva.

Makarjev mortis, apenaŭ sukcesinte antaŭ morto komuniki la sekretojn al amiko sakristiano Konon Osipov.

La energia sakristiano starigis kiel celon de sia vivo trovi la ensorĉitan kaŝitan trezoron kaj serĉis ĝin dum tridek jaroj, ĝis sia morto. Poste-signo de lia serĉado estas konservataj en moskvaj arĥivoj. La dokumentoj estas parte publikigitaj kaj la novtrovataj estas iom post iom ordigataj kaj publikigitaj. El ili oni vidas, ke responde al senpera raporto de Osipov al caro Petro en la 1724 j la lasta ordonis al senato, ke ĝi asigu necesajn monrimecojn por elfosado. La fosado komenciĝis, sed morto de la caro ĝin ĉesigis.

La metodo de la elfosado, kiun komence akceptis Osipov, estis tute racia: iri laŭ vojo de Makarjev. Felice okazo tuj helpis al Osipov trovi la subteran vojon kun ŝtupetoj malsupren; sed lin timigis arĥajo kiu ŝajne minacis falegi. La vojo estis plensufita, kaj ĝi ĉiam la malsperulo-archeologisto komencis, febre, fosi Kremlon desupre renkonte. Atentante la dikeco de la tera tavolo de Kremlo je dedok ĝis dudek arŝinoj (unu arŝino = 71,12 cm. Rim. d Red.), la entrepreno estis senprudenta. La malsukceso, tamen, ne trunkviligis la „revulon“. Post dek jaroj li direktis al la registaro novan raporton pri la neceso daŭrigi la fosadon komencitan dum tempo de Petro, kaj kurioze estas, ke eĉ la Birna registaro de Anna Ivanovna<sup>14)</sup>, eĉ post okazinta konfuzo, konsentis kaj asignis necesan monsumon. Tamen, rezultatoj ne estas videblaj en la dokumentoj Eble, la maljunegulo, Osipov, simple mortis.

La 1891 jaron en Moskvon alvenis por serĉi grekajn manuskriptojn de Homero, sed, precipe, la bibliotekon de Ivano, privat-docento, filologo de la Strassburga universitato, D-o Ed Tremer. En sia informa artikolo pri tio Tremer plendas pri la mortiga skeptikeco de rusaj scienculoj kaj eĉ de Zabelin<sup>15)</sup>. Tremer ne sukcesis trovi la misteran bibliotekon, tamen, li forveturis konvinkita pli ol iam, ke ĝi ekzistas. Lia lasta espero estas archeologi-istoj, kiuj, laŭ lia opinio, — „trankviligos ne pli frue, ol estos plene pruvite, ke la biblioteko fakte estas ekstermita.“

La artikolo de Tremer elvokis toman bruon. Post kvar jaroj eĉ farita estis nova elfosado en Kremlo, nenion, cetere, doninta. La demando pri la biblioteko de Ivano post ĉi tio estis prokrastita por plenaj dudek jaroj kaj denove estis tuŝita nur de l' verkinto de ĉi tiuj linioj. Antaŭ la milito al la cara registaro estis prezentita projekto de nova serĉado de la eŭropa trezoro. Respondo proponis al la archeologia komisiitaro prezenti pruvojn de la ekzistado de l' biblioteko, por asigno de monrimecoj por la supozata esplorado. Samtempe estis permesita libera eniro en ĉiujn arĥivojn kaj, kio precipe gravas, en subterejojn de Kremlo. Fosado en la Arsenalo kaj Sobákin'a turo donis eksterordinare valorajn direktantajn fadenojn, sed subite eksplodinta mond milito ankoraŭfoje flankenŝovis ĉi tiun demandon.

#### Diskutoj.

Koncerne la demandon pri la biblioteko de Ivano inter scienculoj, oni povas diri, ne ĉesadis la plej vivegaj diskutoj. Sin formis eĉ du akresprimataj tendencoj, — de optimistoj kaj de pesimistoj. Senindulga „neulo“ estis mortinta S. Belokurov, kiu eĉ skribis libregon por surbaziĝo de sia nea opinio. Cetere, lin sen malfacilo kaj radike „senmalutiligis“ recenzintoj de lia verko akademianoj Sobolevskij kaj Kobeko. Zabelin mem iom post iom iris sur la flankon de optimistoj. La optimista ideo en niaj tagoj rimarkeble komencas varbi por si adeptojn pli kaj pli.

Oni povas esperi, ke la varmega entuziasmo de l' konstruado de nova vivo fluidigos fine la

14) Rusa imperiestrino, estinta favorinikino al la ĉefo de sia registaro, kruela homo Biron. (Reg. 1730—1740).  
15) Konata rusa historiisto-archeologisto.

glacian ŝelon de la enradikiĝinta rusa skepikeco en ĉi tiu demando.

Ja „la afero koncernas“, — ni diru per vortoj de vera kavaliro serĉanto de la forgesita kaŝita trezoro, Tremer, — ne tiajn sciencajn esplorojn, kiuj meritas atenton nur de negranda rondeto de specialistoj, sed forgesitan trezoron, kies perdo devas ĝagreni la tutan kleran mondon kaj kies eltrovo estus kroninta Rusujon per nova gloro.

„Dank' al ĉi tiu biblioteko Rusujo povus renovigi por Eŭropo la tempojn de princoj Medicis, Petrarca kaj Boccaccio, kiam el polvo de bibliotekoj estis eliritaj nekoniataj trezoroj de antikva tempo.“ (Klossius).

### Esperanto Movado en Sovetlando.

Malrapide, sed konstante kaj senhalte kreskas la Esperanto-movado en Sovetlando. Sovetlanda Esperantista Unuiĝo (S.E.U.), komencas kvaran jaron de sia ekzistado sub bonaj antaŭsignoj. La tuta Sovetlanda Esperanto movado estas unueciga sub la standardo de S.E.U. Ĉiuj aktivaj esperantistoj aliĝis al la deklaracio kaj statuto de S.E.U. La antaŭa la mondmitilo ekzistinta Ruslanda Ligo Esperantista enhavis apenaŭ 50 lokajn grupojn kaj 700 membrojn. Jam antaŭ unu jaro S.E.U. havis ĉirkaŭ 100 lokajn grupojn kaj 2500 membrojn.

U.E.A., kies agado en Ruslando estas nun ĉesigita, havis neniam pli ol 80 delegitojn. Nunamomente la Rajtigitoj de S.E.U., plenumontaj la samajn funkciojn, troviĝas en pli ol 200 lokoj.

Tiaj estas la eksteraj rezultoj de esperantista sovetlanda laborado. Dum nuna jaro S.E.U. entreprenas gravan pluan laboron, celantan plifirmigi la akiritajn poziciojn.

S.E.U., kies agadteritorio ampleksas sesonan de la mondo, fakte ne povas per siaj fortoj volontulaj bone zorgi pri ĉiuj anguloj de la Unuiĝo de Sovetaj Respublikoj. Tial nunamomente organizigas lokaj naciaj federacioj esperantistaj formantaj partiojn nedivideblajn de Centra Organizaĵo — S.E.U. Jam estas organizitaj Federacioj Ukraina, Nord-okcidenta, Blankrusa, Tataara, Centro-Azia kaj Ekstrem-Azia. Ankoraŭ pluaj estaj projektataj. Plifirmigo de la sovetaj financoj kaj ekonomio ebligis enkonduki novan metodon por la membropagoj, kiu ŝatinde plibonigas la financon de S.E.U. Ĉiu membro devige pagas rublon jare al la Centra Kaso kaj interŝanĝe ricevas regulajn aperojn „Bulteno de C.K. de S.E.U.“

Estas entreprenata eldono de novaj lerniloj destinitaj speciale por la mal- kaj mez-klara laboristaro kaj vilaganaro.

Notinda estas ankaŭ la nova faktiko de S.E.U. laborado. Esperantistaj centroj enurbaj estas konservataj ĉefe kiel lokaj komitatoj de S.E.U. urbaj, regionaj, guberniaj ktp. Sed la ĉefa propaganda kaj instrua laboro estas gvidata en esperantaj „ĉeloj“, grupoj — kelkfoje kelkpersonaj, kelkfoje tre multnombraj — ĉe diversaj kluboj, armejoj, fabrikoj, uzinoj, institucioj kaj oficejoj.


Oni klopodas plifirmigi la komunan interesadon pri Esperanto per iu plua komuna intereso, kaj kiel tia servas komunaj ĉiutagaj laboraĵoj, lernejoj, profesiaj aŭ aliaj intereso.

Tiu sistemo entute estas apliko de la organizmetodoj de komunista partio en la movado esperantista. Entute la rezultoj estas sentelaj kaj bonaj. Apartaj organizaĵoj de S.E.U. jam atingis rimarkindajn sukcesojn. En multaj lokoj favoras al la movado administraciaj, politikaj kaj intelektaj aŭtoritatoj. Ŝatinde pligrandiĝis la nombro de lokaj „protektantoj“ de S.E.U.

Ĉi-cio permesas al C.K. de S.E.U. organizi grandan propagandan kampanion kaj varbadon en la vicino de S.E.U.

Tiu varbado celas samtempe novajn kaj malnovajn esperantistojn.

La devizo de tiu varbado estas: Ni bezonas 10000 esperantistojn-membrojn de S.E.U. por la 1 majo 1925. Ĉiu, kiu konas la sovetajn vivkondiĉojn, grandan intereson kiun montras la sovetaj publiko por diversaj aktualaj kaj kulturaj entreprenoj — povas esti certa ke Centra Komitato de S.E.U., proklaminte tiun devizon je la komenco de la 4-a jaro de sia agado, sukcesos ĝin pene realigi.



Ernesto Drezen, prezidanto de Sovetlanda Esp. Unuiĝo (SEU)

Restas ankoraŭ citi kelkajn pri la sukcesoj de S.E.U. celantaj aplikon de Esperanto en aliaj landoj.

Gravan signifon havas oficiala instrukcio de la Popola Komisararo por Poŝto kaj Telegrafo laŭ kiu ĉiumonate la lastan tagon de la monato (se tiu tago estas dimanĉo — do la 1-an tagon de sekvonta monato por la tuta mondo inter la 15 h. 45 m. — 16 h. 30 m. laŭ tempo mez-eŭropa (ondolongo 3200 m), Moskva Radiostacio organizas radioparladojn en Esperanto pri ĝeneralaj kaj esperantaj aktualaĵoj. La 31. 7. parolis E. Drezen pri

rezultoj de pasintjara Esperanto laborado. La 30. 8. parolis G. Demidjuk pri la IV. Kongreso de S.A.T. Samshore per la sama ondolongo ĉiudimanche okazas radio-koncertoj, dum kiuj la programonon okazas en rusa kaj esperanta lingvo. V. Javoronkov organizas radio-kurson esperantan por ĉiuj radiistoj de Rusio (en pli ol 500 ŝtataj stacioj). La kurso baldaŭ komenciĝos. Tiuj paroladoj estas aŭskultataj ne nur de rusaj esperantistoj, sed ankaŭ de multaj eksterlandanoj.

Same grava estas enpenetro de Esperanto en la agadon de nova potencia internacia organizaĵo Filintern (Filatelista Internacio), kiu akceptis Esperanton kiel sian lingvon oficialan kaj komencis jam eldonadi en Esp. A.F.G. — novangazeton „Radio-Filintern“.

Notinde estas, ke tiu organizaĵo en sia pli frua formo (Unuiĝo de rusaj filatelistoj) estis atakita de duo aŭ trio de moskvaj idistoj kaj sisteme enpresis kelkajn anoncojn de ili; sed, ne spertinte utilon pere de ldo movado, ĝi proponis sin turnis al s-o E. Drezen kun peto helpi starigon de esperanta filatela servo. Nun tiu servo estas starigita; en la oficejo de Filintern laboras kelkaj esperantistoj. Ke uzado de Esperanto ĉiam pli vastiĝas, plej bone pravas la fakto, ke en Moskva ĉiutage estas konfistata ŝatinda nombro da sendataj eksterlandaj pakajoj kun emetitaj poŝmarkoj uzitaj (ŝtata monopolo); kaj el tiuj pakajoj pli ol duono estas akompanataj per esperantaj skribajoj.

Idistoj entute preskaŭ ne montras tiun signon de vivo. Projektiita traktado de esperantistoj kaj idistoj-komunistoj ne okazis, ĉar idistoj evitis ĉiun formalan malkaŝan renkonton. El Abhazio, kie laŭ idistro informo ldo estas oficiala enkonduki, venis informo de rajtigito de S.E.U., ke ĉiuj tiurilataj decidaj, faritaj „pro neinformiteco“, estas nuligitaj.

Trankvile kaj konvinkite pri sia sukceso komencas S.E.U. sian 4-an jaron de ekzistado.

Ĝi esperas, ke plivigliĝo de interrilatoj kun eksterlando helpos al plua kresko de Esperanto uzado por la bona kaj intereso de la uzantoj. Tiujn esperojn kontrolos la konferenco de S.E.U. kunvokota tiuare inter la 25 kaj 30 decembro samtempe kun la Tutunuiĝa Kongreso de Sovetoj.

### Esperanto-fokstrot.

Tio, kio ankoraŭ mankis ĝis nun.

Atentema samideano informis nin, ke laŭ informo en „Le Matin“, la konata ĵurnalo de Paris, okazis en Bruxelles la kongreso de dancinstruistoj, kie oni registris kiel novaĵon el Amsterdam „Esperanto-fokstrot“. Ni volonte vidus tiun ĉi fokstrotan kaj ni ne dubas, ke la multnombraj „entuziasmuloj“ en nia movado ne maluzas la okazon por enkonduki ĝin en niajn landojn.

La nova danco kredible por ni havas nur unu avantaĝon, ke ĝi diskonigas la vorton „Esperanto“, sed laŭ kvalito ĝi nur devas esti registrata en la vicon de reklam-titoloj kiel: Bismarck-haringoj, Poincaré-raketoj, Zepellin-kolbasoj, Pégoud-ĉapoj, Zamenhof-poŝtrancilo, Esperanto-parfumo, -sapo, likvoro ktp.

### La komuneca spirito de l' libro.

De Guido K. Brand (Berlin).

De nove fondita korporacio por disvastigo de bonaj kaj malmultekostaj libroj germanaj ni ricevis la sekvan artikolon. Kvankam ĝia lasta celo estas reklama, ni konsideras leginda la enhavon jam simple pro la bonega ideoj pri la valoro de bona libro, de bona biblioteko. Represante la artikolon ni estas ne sole interesitaj pri la subtenindaj ideoj esprimitaj en la artikolo, sed ankaŭ verbi novajn amantojn al bona Esperanto-literaturo. Tre ofte ankoraŭ ĝia grava valoro ne estas rekognita sed de tre fervoraj propagandistoj kaj spiritoj. Ankaŭ la L. K. K. en Wien faris tiun ĉi eraron, disponiginte al la bibliotekoj kaj alparite viglaj akcelantoj de nia movado vendolokojn apenaŭ rimarkindajn de acetemuloj al interesejoj. Iĉi.

La komuneca ideo kaj la provoj por ĝia efektiva malgraŭ ĉiuj kontraŭdiraj, spite al konvinkita rideto de dubemulo, estas signo de nia pene luktanta kaj disŝirita tempo. Montriĝas pli kaj pli kune kun aliaj premisoj la parenceco kaj tempokuneco kun la fino de l' 18. jarcento, kiam skribis Novalis“); „Ĉu ni estas pluraĵ unuecoj, ili devas cedi iom da ĉi pretendado, da sia liberco. Poste, ekzistas komuneco, aŭ ĝenero-similaĵo de l' tuto ĝenerale, ĉu de ŝtato aŭ de komponaĵo.“ Sed same kiel okazis al la romanikuloj, tiel ankaŭ okazis nun malgraŭ ofte bonaj komencoj al kelkaj movadoj: ili farigis „respubliko de nuraj despotoj“. Tio estas la memnigilo de l' komuneco.

Kaj rez estis efektiviĝo de romanika ideo, se kontraŭ al erargviditaj movadoj de l' kunigado, bezanataj sur eraraj premisoj, unu rondo restis viva, konstanta en sia izoleco: la ligo ĉirkaŭ Stefan George. Ĝi estis sporadaj, pri kiuj oni provizore ne povas diri, ĉu ĝi enkondukis epokon de „liga sento“. Provizore oni nur povas diri, ke la streĉado de la pli juna generacio kiel celon de la unuiga, interliga ideo, havas la senton, ke la disfalo de l' ŝtateco, de l' ŝtatintereso, de la artisto, literatura, poeta strukturo de nia tempo puŝas en iu formo al komuna ideokomplekso, kies direkto estas destinata de la volantoj. Ne estas loko tie ĉi por pravi, kial „ligoj“ en la formo de l' rondo de George hodiaŭ ne plu estas elblatitaj unuecoj de l' rondo de nia komuneco“ kaj de la sociologia konsilio al plenumo de tiuj laŭtempaj spiroj kaj deziroj. La difino de la spirita, kulturaj kaj socialaj limoj, la fleksebleco de la „konceptoj pri ŝtato“ (en „Ligo“ ne ekzistas statuto), la „celdifino“ de la fondaĵo „Ligo“ ne estas fondataj, la akcepto de membroj sub certa ideo-premisio, cedante iom de l' libereco de la individuo, estas

formo pli konforma al nia tempo, ĉu estu Goethe-, Kant-aŭ Kleist-societo, ĉu simila entrepreno en formo de „libro-komunumo“. Se ĉi temas pri la spirito de l' poeto, de l' filozofo, de l' tuta verkaro de unu persono, sekve de tio kun centro rezultiganta el si mem, temas ĉi pri la „spirito de l' libro“ ĝenerale. Se estas ĉi la spirito de la interligo en la spirita efiko de unu homo, estas ĉi la plena, varia sindono al la efikeco de multaj spiritoj. Kiel ĉi estas la kreema vivo, la elektiviĝo de unu persono, la tendenco de la interligo: ĉi ĉi estas la genio mem, kiu, venante el nekonebla prafono (do nekonsiderita laŭ formo, enhavo, karaktero), sugestias internan forton en la verkon, kiu, ekkonita kaj travivita de multaj, kreas komunan sferon: la komunecan senton de l' libro. En tiu kaj tiu libro estas io, kio, nekonsiderante iajn literatur-kritikajn punktojn, katenigas nin al la verko, kuniras nin senhalte, tiel ke ni devas posedi ĝin al ni. Neklarigebla estas fundamenta sentoj, kiu puŝas al ni el ĉiuj kaj plej diversspecaj libroj, kiu havas nenion komunan kun eksteraj elementoj (arango, formo, prezentado), kiu ne havas rilaton kun la internaj kondiĉoj, sed alĉovas nin kiel spiro.

Ne estas sole la liberecema afekto kaj klasika idealismo de Schiller, la romanika nerocio de Novalis, la obsinribela forto de Kleist, la ĉiela mildeco de Stifter, la discerbumada psikologio de Dostojevskij, la konsumigia melankolio de Leopardi, la liberigia boneco de Raabe, kiu perforte devigas nin havigi al ni iliajn kreitaĵojn, estas io, kio estas komuna al ĉi ĉi en ilia diverseco, unuiga ideo, io, kio el ĉiuj kaj multaj aliaj „libroj“ kreas „ĝenerosimilecon de l' tuto“ ĝenerale. Tiu fundamenta afekto, tiu spiro estas io, kio vivigadas la posedon de libro. Tra la biblioteko en nia ĉambro pulsas la sento de parenceco de centobla formoj kaj karakteroj. Egaligo de unu estas akcentigo de la alia, sfero superkreskas sferon. Ni staras interne, ekstarigaj, korusitaj, emociataj; vi, mi, ni subite farigis komuno, homoj plenej de l' sama spirito, tuŝitaj de l' sama konsento. Kion volas Raabe aŭ Storm apud Dostojevskij, kion Kleist apud Li-tai-po? Ni kunigas ondojn, ni prezentas konceptojn unu al la alia, poeto, poeziaĵo kaj homo kune kreskas en la sento de l' travivado, de l' ekkono, de enpenetro. Miloj kaj miloj staras antaŭ la vicoj kaj reprezentas unu celadon, unu enpenetradon, unu komunumon de ŝerantaĵ, aspirantoj, travivantoj.

Multaj iras apud ni, senbazaj en la erario de la aperintaĵoj, ne disingante inter valoro kaj nevaloro, senelerte legante, acetante, sensecne metante libron apud libron.

Libro enhavas spiriteco de komuneco. Libro instigas la internon de l' homo al afekto kaj kunafekto de l' sento, de la social konceptoj, de la kulturaj vidpunktoj. Verkoj milfoje obligitaj kreski movadojn, ekkonitaj estas ilia vivanta esprimo, plenumas dezirojn, donas formon al ideoj, sentoj ĝis ilia pleja profundeco. Ĉe ilia apero

ili estas kristaliga punkto, je kiu kunpuŝigas la spirita kaj animaj talentoj senforme troviĝantaj inter la homgrupoj kaj simple bezonantaj ekpuson de ekstere. Entute ĉiu libro valora enhavas tiun ĉi tendencon. Formigis insuloj inter la grupoj elstaras grupoj, dependantaj de ĉi aŭ ĉi spirita aŭ poeta centro. Kunigi tiun insulojn kaj grupojn signifas esti la plej granda tasko plenumota. Ekkono de l' komuneca spirito estas la esenco de l' spirita posedado. Verko de l' posedo sentoj siarpane denove estas partopreno al la komuneco, estas interligo de ĉi al ĉi individuo kaj per tio fine: firmeco de la aparteneco de unu al la alia sub spirita-kultura premisoj.

Nia tempo plena de materialismo necesigas malfirmigon de tiuj bridoj per spiritaĵoj, per ideoj kooperativaj: la libro sub certaj kondiĉoj estas vojo. Ĝi estas sindevigo al kultura havaĵo. Kulturo por si mem estas nenio alia ol komuneco.

Kiel plej eble plenumi tiun ĉi programon estas la celo de „Germana Libro-komunumo“, fondita speciale por popularigi germanan literaturon. Por la kozo de unu ĝm. 3.60 oni rajtas ricevi kvarvokojnare unu volumen dumlekte bintian (laŭ propra elekto el la katalogo). Dum la kuranta jaro ĝis pasko 1925 aperos proksimume 50 volumoj de po 320—450 pagoj. Krome oni ricevas senpage la duonmonatan literaturan organon „La ĵurnal-libro.“ La entrepreno estas ankaŭ rekomendinda al germanaj esperantistoj aŭ eksterlandaj samideanoj, studentaj germanaj lingvon.

Detalaj prospektaj germanlingvaj aŭ informoj estas riceveblaj de Deutsche Buchgemeinschaft, Berlin S. W. 61, Tellowstrasse 61. Ĉiuj jam aperintaj verkoj estas ankoraŭ haveblaj. Trad. R. Kr.

### Tekniko.

#### Triumfo de Zepellin-aerŝipo.

Nia legataro en Eŭropo plejparte jam scias pri la provo-veturado de la plej nova Zepellin-aerŝipo, kiu laŭ kontrakto de Versailles devas esti cedata de Germanujo al Usono.

La nova ŝipo Z. III dum la lastaj semajnoj faris kelkajn plene sukceshavigantaj daŭro-veturadojn, inter alie 40oran veturadon ĝis Danujo kaj Svedujo.

Dum tiuj tagoj okazos ĝia transveturo al Usono. Se la veturo transatlantika sukcesos, tio sendube estas triumfo de germana tekniko kaj de aerveturita industrio. La aerŝipo devos poste servi por konstanta interkomunigo de la du kontinentoj.

Ni salutas tiun ĉi pacan celon de la nova ŝipo kaj simple pro tio deziras, ke ĝi havu kiom plej eble multajn posteulojn.

\*) Novalis = kromonomo de l' germ. poeto Pr. Geo. v. Hardenberg 1772—1801. (Red.)

# Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas scigilojn (sur poŝtikaro aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administraj aŭ privataj scigiloj) pri ĉiu novaĵo el la esp. movado. Kondiĉoj, notico, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

**Ameriko.**  
Brazilio. La 2-a aŭgusto fondiĝis en Rio de Janeiro grupo nomata „Brazilia Esperantista Klubo de Medicino-Studentoj“.  
A. C. F.

**Azio.**  
**Ĥinujo.**  
Changchung. — Kurso jam malfermiĝis. Gvidas s-o Bao Pu. Loka gazeto skribis pri nia lingvo kaj ĝia historio. Oni proponis enkonduki ĝin en lernejojn.  
Cuenchow. — Fondiĝis Esperanto-societo.

Kanton. — Je la komenco de aprilo Ĥinoo Root paroladis en la Alta Normala Lernejo, Unua Mez-Lernejo, Leĝo-Lernejo, Lin-Nan Universitato, Y.M.C.A. kaj Cen-Kiang Lernejo.

En la Alta Normala Lernejo elparolada kurso funkciis kun 70 studentoj, gvidata de s-o Samlin.  
Multaj studentoj de Ĥi-sin Lernejo kaj de Normala Lernejo por Virinoj interesiĝis pri nia lingvo. Kursojn oni jam aranĝis. Gvidis s-oj Samlin kaj J.J. Sih. En nia lando ankoraŭ ne ekzistas kurso en virina lernejo. Ĝi estas la unua. Ni esperas ke malraj virinaj lernejoj sekvos post ne longe.

Kiangchow. — Kurso komenciĝis en la 4-a Mez-Lernejo kun 40 kursanoj, gvidata de s-o H. S. Huang.  
Nanturg. — En Nanturg nia movado ne plu silentas. Grupo fondiĝis, kursojn oni jam aranĝis en Unua Normala Lernejo. Multaj studentoj sin verbas. S-oj T.K. Ĥio kaj C. C. Can estas ĝiaj gvidantoj.

Pekin. — S-o Ossaĉi el Tokio je la fino de aprilo paroladis en Pekina Universitato kaj Pekina Esperanto-Kolegio, kun granda amaso da aŭdantoj.

Sanĥaj. — La Telegrafista Esperanto-Asocio ricevis peton al hina registaro de la Universala Unuiĝo de Poŝto kaj Telegrafo. Oni jam ĝin tradukis Ĥin. Kun la originala letero oni jam sendis al la Ministerio de Komunikado, Pekin, kune kun la oficiala letero petanta al registaro, ke en ĉiu Telegrafio ĝi akceptu Esp. kiel „klaran lingvon“, kaj ke ĉiuj telegrafistoj lernu ĝin lingvon.

Ĥilino Root paroladis la 25 februaro en la Leĝo-lernejo por Virinoj pri Esperanto kaj tutmonda paco. La 23. 2. Ĥilino Root paroladis pri neceso de universala helpa lingvo en Y.M.C.A.

Japena s-ano s-o K. Ossaĉi, redaktoro de „Revuo Orienta“, alvenis Sanĥajon la 2. majo. La loka esperantistaro lin bonvenigis la 4-an 2. h. p. n. en la Hina Naci-lingva Kolegio, kun amasa ĉestintaro, prezidata de s-o Ĥiouchi. Post la enkondukata parolado de s-o Ĥen Ĉai-Ĥin, s-o Ossaĉi donis al ni tre interesan paroladon: „Egalrajteco de Gentoj kaj Lingvo Internacia“. Sekvis parolado de rusa samideano s-o Kolomiets. La 7 vespere adiaŭa kunveno okazis ĉe la „Jue-Lin Pou“. S-o Ossaĉi Ĥiu el loĝoj vizitis Ĥinujojn parte por esplori fervojan sistemon, ĉar profesie li estas fervoja inĝeniero, kaj parte por Esperanto-movado en Ĥinujo. Estas la komenco ke japana samideano unuiĝas kaj kunlaboras kun hina esperantistaro.

Kurso por divers-naciecaj komencantoj funkciis en la angla lernejo People's Academy, gvidata de s-o Ĥen Ĉai-Ĥin.

La Naclingva Kolegio de Komercia Presejo ankaŭ aldonis esp. kurson, gvidatan de s-o Ĥuĵuc.

Tsinan. — Vespera kurso malfermiĝis. Gvidis s-o Liu Ĥi-Huaj.

S-o Ossaĉi 13. 4. alveninte el Tsing-tao, 14. 4. vespere donis paroladon ĉe Tsinan Universitato. „Pro kio ni bezonas Lingvon Internacian kaj kiu lingvo povas esti internacia.“

Dank! al UEA de ĝiejo s-o Liu Ĥi-Huaj kaj vic-delegito s-o D. C. Yu, varbi ĝis multaj novaj membroj de UEA.

Wuchang. Nova grupo fondiĝis en la Komercia Universitato. Kurso jam komencis sub la gvidado de s-o Jan Kuei-Tin.

S-oj T. L. Ĥan, F. S. Ĉan, Jan Kuei-Tin, k. a. aranĝis lokan Esp. Asocion.

Je la komenco de marto Ĥilino Root alvenis Wuchang kaj Hankow. Paroladis en Komercia Universitato, Normala Univ. Ĉun-Gua Univ. Laste paroladis en Y.M.C.A., Hankow, pri Esp-to kaj Bahaismo.

## Eŭropo.

### Aŭstrio.

Grossart. Novan kurson komencis instruisto Schnabel.

### Ĉeĥoslovakio.

Studenta Esperanta Ekspozicio en Rychnov n. Kn., estis en tagoj 24—31 aŭg. de n. l. daŭranta. Vizitis ĝin ĉirkaŭ 1500 personoj! Publika kurso sekvis. Pro vigla intereso de studentaro la provizora Stud. Esp. Rondeto aliformiĝis je efektiva. Oni deziras eklogi rilatojn kun eksterlandaj stud. rondetoj. Adreso: J. Kopecky, studento, Rychnov n. Kn. (por Stud. Esp. Rondeto).

### Germanujo.

Landshut. La loka grupo de „Germana Esperanto Asocio“ okazis propagandparoladon en la ĉi tiea katolika metihelpista societo kune kun ekspozicio de esperantistoj. S-o Hubauer del. de UEA parolis pri: „La mondlingva problemoj kaj ĝia solvo per Esp.“ Tuj aliĝis 14 komencantoj al nova kurso. Krome komenciĝas en oktobro alia kurso kun 11 partoprenantoj. La kursojn gvidas s-ano Hubauer.

### Hispanujo.

Badaĵoz. La lastan tagon de pasinta aŭgusto oni starigis en Ĥiu-ĉi ĉefurbo samideanan societon kun la nomo de „Esperantista Grupo Pacense“, kies Direktanta Komitato estas: prez. s-o Ludoviko Campos, vicprez. s-o Rodrigo Almada, sek. s-o Patillas, kastiŝto s-o Córcolas kaj voĉdonantoj s-oj Valero, Alcaraz kaj Rando.

Balearaĵ Insuloj. Oni starigis en la pentra urbo Soller esperantan grupon, kies direktanta komitato estis elektita inter la plej altiraj solitaroj. S-o Gabriel Alomar, Prezidanto de la grupo Palma, la delegito de UEA s-o Barceló kaj la aŭtoritatoj de la insulo solenigis la feston per sia ĉeesto.

### „Federacio Esperantista Levantina.“

Ĉeste (Valencio). La 19 oktobro la valenciaj esperantistoj kunvenis en apuda malgranda urbo Ĉeste por okazigi tie la Unuan Regionan Kongreson de la „Federacio Esperantista Levantina“ laŭ invito de la urbestro kaj ĉefaj societoj el Ĉeste. Oni esperas ke la plimulto el la esperantistoj loĝantaj en la provincoj Valencia, Castellon, Alicante, Murcia kaj Albacete partoprenos Ĥin kunvenon. Detaloj sekvos.

## Italujo.

Torino. Laŭ decido de la Itala Katedro de Esperanto la estraro de la Esp.-insituto pri la Piemonto estas la jena:

Gr. Of. Giani D-o Giuseppe, direktoro, Ĥing. De Balzac Marcello, vicedirektoro, s-o Ramollo Franco, sek. Ĥing. Muretĥi Mario, konsilanto, kav. Sacconi Berardo, konsilanto. Sekretariejo: Piazza Vittorio Veneto 14.

La Spezia. La loka grupo restarigiĝis sur pli larĝa bazo. Malnovaj samideanoj Ĥing. Majoro Gagnotto, Kom. Peri, s-o Gerbi helpataj de kelkaj novaj samideanoj sukcesis vekti en la urbo intereson pri Esp. Kursoj komencos post unu monato.

Oni okazigos paroladon pri la XVI-a. Samideanoj kiuj havas fotografaĵojn el Wien estas petataj sendi Ĥin al Ĥing. R. Orengo, Via Manzoni 3. La Spezia, Ĥing. pro preparo de lumbildoj. Laŭ deziro oni pagos la fotografaĵojn.

Regulaĵ malfermo de la kunveno: Mk. 13<sup>1/2</sup>, V. 20<sup>1/2</sup>, D. 11. Sirato Manzoni apud Aleo, Mazzini.

La poŝta adreso de la grupo estas: Esperanto-Grupo de La Spezia, de S.I.E.L. Via Spallanzani 5, La Spezia, Ĥitallio. La estraro de la grupo estis elektata jene:

S-o Ĥing. Mai. Gagnotto, prez., s-o Prof. D-o Sangiorgio, vicprez., s-o Gerbi, sek., s-o Poggi, vicsek., s-o Bonanni, konsilanto, s-o Bassi, konsilanto, s-o Fiorentini, bibl.

## Jugoslavo.

Subotica. 15 septembro malfermiĝis du kursoj por komencantoj kun 85 partoprenantoj. Gvidas la del. de UEA Bela Sliĥer.

## Rusujo.

Vjatka. Esperanta movado ĉi-tie bazas sin sur pagendo de lokaj esperantistoj. Oni kunigis ĉiulande en klubo de regnaj kaj administraciaj laboristoj kaj legas laŭvoĉe artikolojn el esp. gazetoj.

Oni aŭskultas esperantajn radioparoladojn kaj koncertojn de SEU Moskva, pri kiuj ĉiulfoje estas presataj en loka oficiala gazeto „Vjatskaja Pravda“ notoj de k-do Alalĥin.

La kursoj baldaŭ malfermotaj.

Serpenhovo. S-o A. Paŝomov malfermis novajn kursojn kun 114 partoprenantoj.

## Esperanto en Lernejo.

### Germanujo.

Wiesbaden. Komence de septembro komenciĝis kurso por ĝinstruistoj en mez- kaj Ĥinollernejoj kun 25 partoprenantoj. La urba lerna administracio disponigis senpagan instruĉambron en Liceo. Sama kurso komenciĝis en Elville kun 25 partoprenantoj el Elville kaj la ĉirkaŭlokaĵa vilaĝoj. Ambaŭ kursojn gvidas instruisto Kuri Schörrich.

### Ĥinujo.

Wuchang. — Prezidanto de Ĥun Hua Universitato en Wuchang, s-o Ĥen Si, reveninte el la Internacia Konferenco de Edukado dum last-jaro, ekscitis ke internacia lingvo estas tre necesa. Li jam aranĝis specialan kurson por Esp-to. Instruistoj estas s-o T. L. Ĥan. Nun Esp-to estas enkondukata al leĝo-lernejo kiel deviga kurso. Estas la unuan fojon ke Esp-to estas enkondukata kiel deviga kurso en universitato en Ĥinujo.

## Radio.

### Radiostacio Hamburg.

Por provi la eflikon de radio-prezentadoj la stacio de Hamburg komencante la 15. 10. ĉiu-vespere aranĝos Esperanto-prezentadojn sub la titolo „Dek minutoj da Esperanto“. S-o Karl Minor, L. K. disaŭdigis novaĵojn en Esperanto. (Ondolongo 589, la horo estos ankoraŭ sciligata).

De la provoj dependos ĉu ĉi prezentadoj kaj pro Ĥiu radio-aŭskultantoj estas petataj informi la stacion pri la rezultoj.

Por instigi la stacion ĉu ĉi uzi Esperanton por Ĥiu celo kaj malfermiĝi Esperanto-kursojn ĉiuj agemaj samideanoj sendu gratul-leterojn al la stacio por pruvi, ke Esperanto estas disvastigita en tuta mondo kaj la sola helpilingvo de l' mondo-traffic.

Memoru, ke estas honordece, subteni la klopodojn de hamburgaj samideanoj! Adreso por leteroj kaj kartoj: „Noreg“, Artushof, Gr. Bleichen, Hamburg.

De la nombro de alvenintaj skribajtoj dependos multo.

### UEA-Karavano Strasburg-Wien-Lyon.

S-o Poncet, Lyon, la gvidinto de la bone sukcesinta UEA-karavano franca, sendis al ni detalan cikuleron, enhavantaĵan la lastan detalarton por la partoprenintoj. Pro manko de loko ni bedaŭrinde ne povas reprez. la tutaj cikuleron, sed rekomendas al partoprenintoj peti la cikuleron kontraŭ respondkuponno de s-o L. Poncet, 30, rue Ferrandière, Lyon.

Samtempe li anoncas la akireblon de 7 karavan-fotografaĵoj: Salzburg-Mönchberg (du bildoj), Wien, Restoracio malantaŭ la kongresejo, antaŭ la urbdomo, Salzburg Gaisberg, Bern, antaŭ la monumento de Univ. Tel. Unio, Bern-Gurten. Ĉiuj bildoj en formato de 6,5x9 cm estas haveblaj por po 0.50 fr. fk. plus sendkosto. La fotoj 1, 2, 6, 7, estas ankaŭ haveblaj en grandeco de 10x15 cm (poŝikarto).

Ne estas dubeble, ke multaj partoprenintoj deziras havi bildojn de la karavan-vojaĝo sub gvidado de l' bone konata, multjara karavanesro.

### Por aktualigi ET

ni bezonas mallongajn tradukojn aŭ originalojn praktikajn el plej diversaj sferoj. Interesatoj bonvolu subteni nin aktive.

## La Deksesa.

### Napoli kaj Capri.

Rondirado tra la urbo. — La almozuloj. — „Zampironi“. — Capri kaj la „Grotta Azzurra“. — Diferenĉego de prezoj. — Lingva instruo laŭ rekta metodo.

La unuan tagon de mia vizito al Napoli mi estis tro laca por havi veran guto de la novaj impresoj. Du noktoj antaŭe mi dormis nur mal-multe; nek la ŝipo nek la vagonaro estis laŭge dormejo. Kaj en Bari mi promenadis preskaŭ la tutan tagon kun la samideanoj.

Tamen mi vidis jam multe. Tuj post mia alveno en Napoli mi faris rondiradon: sur Corso Umberto I-a, kiu kondukas de la stacidomo en rekta linio tra la duona urbo, trans la Placon de la Borsio al la Castelnuovo (Nova Kastelo), preter la Reĝa Palaco al Via Partenope apud la maro, de kie oni havas vidon al la Kastelo dell'Ovo, tiel nomita pro sia ova formo. De tie mi iris tra multaj stratetoj kaj ŝtuparoj al Corso Vittorio Emanuele, kiu kuŝas alte kaj kondukas ĉirkaŭ monto, sur kiu staras Kastelo San Elmo.

De Corso Vittorio Emanuele oni havas belajn vidojn super la urbejon kun ĝiaj multaj kupoloj kaj ordinare ankaŭ al vulkano Vesuvio. Bedaŭrinde la aero estis hodiaŭ malklara, tiel ke oni ne povis distingi la horizonton; ankaŭ Vesuvio ne estis videbla. De Corso Vittorio Emanuele oni povas ankaŭ enrigardi Ĥin en unu, Ĥin en alian el la multnombraj mallarĝaj stratetoj, similie kiel pli miniature en Dubrovnik.

Poste mi malsupreniris al Via Roma, kiu — same kiel Corso Umberto I-a sed en alia direkto — kondukas tra la duona urbo. Ĉe daŭrige de Ĥiu strato — la „Salita Museo“ — staras la Museo Nazionale (Nacia Muzeo), kiun mi ankaŭ vizitis, precipe por rigardi la freskojn kaj mozaikojn trovitajn en Pompeji, ĉar Pompeji mem mi ne povas viziti.

Fine mi revenis al la Piazza Gribaldi antaŭ la stacidomo, kie mi luis ĉambron en unu el la multaj hoteloj ĉirkaŭantaj la placon.

Koncerne la tradumadojn, mi jam lernis mal-atenti Ĥin. Alie estus neeble sin savi de Ĥin. Nur dum la tagmanĝo, kiun mi prenis en restoracio apud malferma fenestro, ne malplii ol ok almozuloj kaj Ĥin alpetis min. Se oni volus kontentigi Ĥin, jam post kvar horoj la manĝo estus tute malplena.

Volonte oni pagus specialan imposton, se la ŝtato aŭ la konsumo volus garantiĝi, ke oni restus nefedata dum la daŭro de la restado.

Ekzistas homoj, kiuj estas tre mizeraj kaj bezonegus almozon; sed kiu apartigas la efektivan mizerulojn de la nuraj mallaboremuloj? Mi donis Ĥin al Ĥiu, Ĥin al alia kelkajn soldojn; sed ĉu Ĥiste Ĥi estis la mizeruloj? Kiu scias? Mizeraj Ĥi aspektas Ĥiu. Kaj ĉu kelkaj soldoj povas forpeli veran mizeron?

— La unuan nokton en Napoli mi dormis bonege. Eĉ mi ne sentis la „zanzare“, ĉar mi bruligis vespere kelkajn piramidojn de t. n. „Zampironi“, kiuj estas taŭga rimedo kontraŭ Ĥiu pikemuloj. Ĉi-loke mi volas menci, ke en Wien kaj Budapest mi preskaŭ ne rimarkis kulojn nek muŝojn; Ĥiurilate Ĥiu urboj estis tre agrablaj. En Zagreb mi jam trovis pli multe da Ĥi; sed apud la Adriatiko Ĥi troviĝas amase kaj estas kelkloke eĉ transportantoj de malsano.

— La sekvintan tagon mi estis en Capri. Mi vizitis Capri precipe por havi komparon kun B-ŝevo.

Estis belega ekskurso en internacia societo per tre komforta ŝipo „Regina Elena“.

Ni forlasis la haveneton Santa Lucia ĉirkaŭ la 8-a kaj duono. Dum longa tempo ni preterveturis la urbejon; estis grandioza panoramo — la urbejo laŭborde apud la Golfo, kun la Kastelo San Elmo super Ĥi. Nur domage, ke nuboj kovris la tutan bordon, dume la ĉielo super la maro estis klara. Vesuvio estis hodiaŭ videbla, sed ankaŭ Ĥian supren kovris nuboj.

Ni haltis unue apud Sorrento, multe pri-kantita urbo, poste apud la Marina Grande en Capri kaj fine apud la Grotta Azzurra, la blua groto.

La eniro en Ĥin estas eĉ pli mallarĝa ol Ĥiu en la groto de B-ŝevo. Ankaŭ ĉi tie denove surprizis min la intensa bluceo de la akvo. Bedaŭrinde la sunlumo estis ne tre konvena, ĉar mi ne rimarkis Ĥin mirigan diafanecon, kiu distingis la akvon en la groto de B-ŝevo.

Poste ni denove haltis apud la Marina Grande. Estis tagmezo, kaj ni sentis apetiton. Sed kiu diferenco inter la prezo de Capri kaj Ĥiu de Komiza! Ĥi estas akurate la sesobla. Oni vidas, ke Ĥi tie oni scias profiti je la fremduloj; en Dalmacio oni ankoraŭ ne lernis Ĥin tiom, esperable oni lernos Ĥin neniam.

En Italujo la altaj prezoj tute ne estas pravigebaj, ĉar Ĥenerale la tieaj vivkostoj ne estas altaj. Tion oni vidas ankaŭ ĉe komparo de la prezoj en diversaj restoracioj, kafejoj ktp.

Hieraŭ, ekzemple, mi pagis por taseto da kafeo en malgranda kafejo nur dekkvin centimojn; en pli granda kafejo mi pagis unu Ĥiron kaj kvindek centimojn, do la dekboblon. En modesta restoracio oni povas tagmanĝi por 6—8 Ĥiroj; hodiaŭ en

Capri mi pagis — sed prefere mi silentu; mi diru nur, ke la prezoj en Budapeŝt estas modestaj kompare al tiuj de Capri.

Cetero estas stranga kutimo en la t.n. pli bonaj restoracioj en Italujo, krom la jam sufiĉe alta prezo por menuo ankoraŭ postuli specialan pagon por manĝilaro; oni ja ne povus preni la manĝaĵojn sen telero, tranĉilo kaj forko!

Insulo Capri estas belega kaj interese. Bedaŭrinde en kelkaj horoj oni ne povas vidi eĉ la plej interesajn vidindaĵojn.

Mi nur veturis tuj post la alveno per dentrada fervojo de la abordiĝejo Marina Grande al urbo Capri, kie mi tagmanĝis, kaj iris de tie sur la ŝoseo supren al Anacapri kaj returne. Tiu ŝoseo estas kvazaŭ algluita al la rokoj, kaj oni ĝuas de ĝi vastan perspektivon super la Golfon de Napoli.

Ni forlasis Capri je 5 h. kaj alvenis en Napoli je vesperiĝo. Kiam ni enhaveniĝis, ni vidis dekstre kaj maldekstre en la krepusko tutan skadron da grandaj kaj malgrandaj militŝipoj. Oni iris, ke ili ĉeestas, ĉar post kelkaj tagoj la reĝo vizitos la urbon.

La veturado sur „Regina Elena“ estis tre interesa, ne nur la bela perspektivo, kiun oni ĝuis dum la tuta tempo, sed ankaŭ la societo de la kunpasaĝeroj, kiu estis tute interracia. Precipe oni aŭdis la tri ĉefajn lingvojn de Eŭropo: la anglan, germanan kaj francan, kaj la lingvon de la lando mem: la italan.

Kurioze estis aŭskulti, kiamaniere itala knabino provis klarigi al germana amikino la sencnon de itala vortoj kaj frazoj, helpe de gestoj kaj kelkastrekaĵoj. Komprenible okazis multe da erarkomprenejoj, pri kiuj ne nur la du knabinoj, sed ankaŭ multaj kunvojaĝantoj elkore ridis. Espereble la itala knabinec lernas Esperanton; ŝi havas talenton por instrui lingvojn, kaj estus ĝojige, se ŝi metus sian talenton en la servon de nia afero.

#### Al Roma.

Gardeno. — Junulo, al kiu mi devas helpi matenmanĝi. — Interesaj vidaĵoj.

Vera ĝardenego estas la regiono, tra kiu min portas la vagonaro nun. Tutajna mejlojn oni vidas preskaŭ nur fruktarbojn kaj vinberujojn. Je la alia flanko etendiĝas Vesuvio, nun tute klara; ĝia kratero eligas fumon, kiu ŝvebas kiel nubo super ĝi.

Kontraŭ mi eksidas junulo, komencas matenmanĝi. Afable li invitas min, helpi lin ĉe tiu okupo. Mi rifuzas dankante. Sed li kvazaŭ devigas min manĝi de liaj panoj kaj kolbaso kaj trinki kelkajn glutojn de lia bona vino. Tro afable li estas. Li parolas iom angle, sed komprenas miajn kelkajn italan parolojn aŭ esperantajn vortojn kun italaĵoj pli bone ol miajn anglajn parolojn; male, al mi liaj anglaj paroloj estas pli komprenablaj ol lia itala dialekto.

La vidaĵo tra la fenestro restas interesa. Ni transverŝas sur ponto riveron, supeble estas Volturno. Poste la vojo kondukas ĉiam tra montaro pli malpli alta. Preterpasas urbetoj, vilaĝoj kaj ruinoj, parte romantike situantaj sur monto. Unufoje videbliĝas granda monaĥejo sur alta monto — mi kredas, ke estas monto Cassino, kie ekzistis la unua kristana monaĥejo en la mondo.

La vagonaro iras rapide kaj haltas nur tre malofte. Post iom pli ol kvar horoj Roma estas atingita.

#### Roma.

Kio plej multe impresis min. — Policianoj en frako kaj blankaj gantoj.

Tio do estas Roma.

Iom neatendita estas la impresoj, kiuj ĝi faris sur min.

Nek la ruinoj de Forum, nek la efektive kolosaj mezuroj de Colosseum aŭ de la termoj de Caracalla, nek eĉ la Katedralo de S-ta Petro impresis min tiel, kiel mi estis supozinta. Vere magian impreson tamen faris sur min la Panteono.

Certe, la ruinaĵoj de kaj ĉirkaŭ la Forumo estas grandiozaj; sed ili postlasas nur senton de funebro pri pasinta granda epoko. Ankaŭ la katedralo de Sankta Petro estas unika. De ekstere ĝi ne aspektas tiel impone kiel oni devas supozigi laŭ ĝiaj konataj mezuroj. Sed la interno estas vastega. Vastega, lumplena kaj superrigardebla. Miel grandega salonego. Kaj alta, alta la kupolo. Sub ĝi la strangasfila papa altaro, kun kvar kolonoj en formo de hariloj. Ĉirkaŭe la kvindek kapeloj, unu pli bela ol la alia.

Tamen pli surpriza estis la impresoj, kiuj mi havis enirinte la Panteonon. La tuta konstruaĵo estas unu granda runda subkonstruaĵo de kupolo. Unu sola fenestro troviĝas en la mezo de la kupolo; sed tra ĝi enfluas amaso da taglumo, kiu kaŭzas mirigajn efikojn de lumo kaj ombro, precipe sur la kvin vicoj po dudek kvar kvadrataj ornamaĵoj, kiuj troviĝas en la kupolo. Longan tempon mi restadis por rigardi tiun magian efikon kaj nur nevolonte mi forlasis la Panteonon.

Pli mi ne diros pri la arkitekturaj vidindaĵoj de Roma, kie oni trovas 500 preĝejojn kaj kie preskaŭ ĉiu domo estas palaco. Centoj da plileruloj ol mi jam priskribis siajn impresojn en la metropolo de la kristana mondo. Cetero estus iom granda pretendo, se mi volus doni kompetentan juĝon post apenaŭ dutaga restado. Bedaŭrinde mi ne povis viziti la mondfamajn kolektojn de Vatikano, ĉar sabato mi alvenis tro malfrue, kaj dimanĉon ili restis fermitaj.

Koncerne la aliajn spertojn, kiujn mi faris en Bari kaj Napoli, mi povas diri pri Roma, ke ĉi tie la cirkonstancoj estas pli bonaj. Ne ekzistas tiom da truduloj kaj almozoŭoj, kvankam ĉe la lokoj frekventataj de fremduloj — ekz. ĉe la Baziliko de S-ta Petro, ĉe la Koloseo ktp. — mi ne restis neĝenata.

Mi devas miri pri la ŝajne neregula trafiko sur la stratoj. En Bari oni diris al mi, ke tie tute ne ekzistas regulo. En Napoli mi rimarkis, ke la tramoj veturas maldekstre, same kiel en Vien; sed en Roma ili veturas dekstre, kiel en Germanujo.

Iom strange, kvankam plaĉe por la okulo, aspektas la policanoj, la t.n. *Carabinieri*. Ili portas uniformon, kvazaŭ ili volus partopreni kostumfeston: frakon, blankajn gantojn kaj sur la kapo „trikornulon“. Pli strange ankoraŭ, eĉ tute mezepoke, aspektas la Svisa Gardio de la Vatikano; sed ĝia funkcio estas preskaŭ nur ceremonia.

Lauŝajne estas nuntempe malmulte da fremduloj en Roma. Almenaŭ en la plej vidindaj lokoj — la katedralo de S-ta Petro kaj la Forumo — mi vidis nur kelkajn vizitantojn.

En Roma mi restis apenaŭ du tagojn, kaj jam mi forlasis ĝin.

#### Firenze.

„La Bella“ — Unika panoramo. — Katedralo el marmoro de tri diversaj koloroj. — Renkonto kun surstrata vendisto.

Prave oni nomas tiun urbon la „Bella“. Sed pli bela ol la urbo mem estas ĝia situo. Bedaŭrinde mi havis nur kelkajn horojn por rigardi ĝin.

Tute unika estas la panoramo de la urbo, kiun oni havas starante sur la al-ĵoj ĉirkaŭantaj ĝin. Mi ĝuis ĝin de sur Bellosguardo. Ĝi estas la plej bela rigardo al urbo, kiun mi konas ĝis nun. Parte komparebla kun ĝi estas nur la rigardo, kiun oni havas al la urbo Heidelberg de ĝia fama kastelo.

Alte superstaras la kupolo de la katedralo la urbon. Kaj ankaŭ la ceteraj kupoloj kaj turoj rebrilas en la radioj de ĝi suno.

Interesa estas la materialo, el kiu estas konstruita la katedralo: blanka, nigra kaj ruĝeta marmoro, kies kunordigo kaŭzas strangan efikon de koloroj je la okulo.

Vidinda estas ankaŭ la „Palazzo Vecchio“, iama sidejo de la respublika registaro, la „Loggia dei Lanzi“, la palacoj Strozzi kaj Pitti, la Ponto Vecchio, kaj la diversaj muzeoj, kiujn mi ne povis viziti pro manko de tempo.

Fine mi volas rakonti pri renkonto, kiun mi havis kun strativendisto, kaj kiu estas karakteriza por la marĉandemio kutima en tuta Italujo.

Mi sidis apud tablo de kafejo proksime de la katedralo. Jen venis li kaj proponis al mi kopion de fama pentraĵo de itala majstro faritan el bronzaspekta ferlado. Li postulis por ĝi 20 lirojn. Vidante, ke mi ne emas aĉeti, li malaltigis la prezon.

„Ni diru 18 lirojn!“ li diris. „16 lirojn, 15! Jen mi aldonas ankoraŭ alian bildon, kaj ambaŭ kostu 20 lirojn! Jen tria — ĉiuj tri por 25 liroj! Nu, sinjoro, ĉu vi ne volas aĉeti de mi tiujn belajn bildojn el vera bronzo? Tri por 25! Mi bankrotiĝos. Jen mi aldonas kvaran; sed mi tute certe bankrotiĝos. Nu, nu, sinjoro, ĉu? Ĉu vi volas: ĉiuj kvar por 25 liroj! Estas donacite!“

Por malhelpi, ke la homo bankrotiĝu, mi fine aĉetis; ĉar efektive 25 liroj ne estas granda sumo, kaj ekzistas personoj, al kiuj mi povos fari ĝojon donacante al ili kelkajn de tiaj bildoj el „vera bronzo“. Nur unu domaĝon kaŭzas tiuj bildoj el „vera bronzo“: ili multe plipezigas mian kofron, kiu estas jam sufiĉe peza por la kelkcent ilustraĵoj kartoj kaj diversaj gvidlibroj, kiujn mi aĉetis en la urboj vizititaj.

#### Al Venezia.

Mi alvenis en Firenze la 8 septembro matene kaj forlasis ĝin la saman posttagmezon.

La fervojo iras komence tra floranta regiono, poste ĝi transiras la Apeninon per multego da tuneloj, viaduktoj kaj pontoj. Oni havas belegajn perspektivojn; sed la fumo, kiu en la tuneloj penetras tra la fermitaj fenestroj, kune kun la granda vermego, estas tre malagrabla.

Mi ĝoias, kiam Bologna estas atingita, ĉar nun ĉesas la tuneloj. En Bologna mi devas ŝanĝi la vagonaron, kion mi multe bedaŭras, ĉar ĝis nun mi havis bonan sidokolon, sed depost Bologna mi devas resti en la koridoro.

Vespere je 21.20 h. precize la vagonaro alvenas en la stacidomo de Venezia, transversinte la maron sur longa ponto. Akceptas min afable s-o Prof. Pizzi kaj kondukas min al hotelo sur Lido.

#### Venezia.

Plenluno super kanaloj kaj marmorpalacoj. — Urbo en maro. — Placo de S-ta Marko: salonego sen plafono. — Grandioza iluminado. — Vasaloj kaj reĝino. — Inter afablaj gesamideanoj.

Tio estis belega veturado per ŝipeto sur la Canal Grande kaj poste al Lido, vespere en la brilo de la preskaŭ plena luno. Tute kiel mi estis supozinta ĉe la forlaso de Dalmacio.

Trankvile iras la ŝipeto; estas kvazaŭ ŝvebado. Dekstre kaj maldekstre preterpasas la marmorpalacoj. La ponto de Rialto, pri kiu mi jam tiom legis kaj aŭdis, volbiĝas super mi.

Kaj nun, ĉe la fino de Canal Grande, maldekstre aperas fabelaj palacoj, gracia turo kaj strangasfila konstruaĵo kun multaj kupoloj — ĉio ŝajnas farita el blanka marmoro pro la brilo de luno. Estas la *Campanile*, t. e. la sonorilturo, la Katedralo de Sankta Marko, la Palaco de la Doĝoj kaj aliaj palacoj, ĝis nun nur viditaj sur bildoj kaj en sonĝoj kaj nun reale starantaj antaŭ mi — la plej miriga vidaĵo, kiun mi vidis dum mia vojaĝo.

En la groto de Biŝevo mi opiniis, ke ne povas ekzisti io pli miriga; en Dubrovnik min ravis la bela situo de la urbetoj kun la bluj maroj kaj ĉielo, kun la blankaj domoj kaj veloj, kun la grandiozaj rokoj, kun la verdaj palmoj; la Golfo de Kotor prezentis nekompareblajn panoramojn; Napoli, Roma havis siajn specialajn allogaĵojn; mi admiris Firenze la Belan de sur Bellosguardo; sed tiu mallonga rigardo de sur la ŝipeto al la fabela „Piazzetta“ kun la Palaco de la Doĝoj, la kupoloj de San Marco kaj la Campanile, brilantaj tutblanke en la radioj de la luno, enombriĝis ĉiujn ĝisnunajn vidaĵojn.

Nur mallonga estis tiu unua rigardo, sed por ĉiu tempo ĝi restos en mia memoro.

\* \* \*

En Venezia mi restis tri tagojn. Mi loĝis bone kaj je akceptebla prezo en hotelo Wagner sur Lido, kie pasintjare loĝis la partoprenintoj de la Komerca Konferenco.

Tri tagoj ne estas multe por rigardi tiun urbon kia estas Venezia. Tute unika ĝi estas. Ĝi estas efektive urbo en maro. Krom la Canal Grande, multego da malgrandaj kanaletoj transversas la ĉefan parton de la urbo, tiel ke multajn domojn oni povas atingi nur per gondolo. Sed ekzistas ankaŭ multego da stratoj. Ili estas ĝenerale tre mallarĝaj. Tamen ili sufiĉas, ĉar en Venezia oni vidas nenian veturilon krom ŝipoj kaj gondoloj, nek tramon, nek aŭtomobilon, nek fakron, nek biciklon. Por homoj kun malsanaj nervoj tio estas idilia stato, ĉar oni ne bezonas ekscitiĝi pro la bruego de la veturiloj nek timi, ke oni estos renversata. La solaj veturiloj, kiujn posedas Venezia, iras sur la akvo kaj preskaŭ ne kaŭzas bruon.

Tute unika peco da tero estas la Placo de Sankta Marko (Piazza San Marco) kun la Placeto (Piazzetta). Ĝi estas kvazaŭ grandioza salonego, kies murojn formas la palacoj kun preskaŭ senfinaj kolonadoj kaj kies plafono estas la vasta firmamento. Ankaŭ tie neniam ajn veturilo ĝenas la trafikon de la piedirantoj. La kolonadoj kaŭzas luksajn magazenojn, kaj eĉ dum pluvoveturo estas interese promeni tie.

Vespere sur la Placo koncertas granda orkestro de ladinstrumentoj. Ĉiuj povas senpage aŭskulti. Kiu estas laca aŭ kiu volas trankvile ĝui la vidaĵojn de la trafiko sur la Placo, tiu povas sidigi apud unu el la multaj tabloj starantaj tie kaj trinki vinon, kafon ktp. aŭ manĝi glaciaĵon.

Belegajn vidaĵojn mi havis unuvespere, starante apud la bordo de la maro kaj rigardante al la Piazzetta. En malproksimo estis forta fulmotondro. Unu fulmo sekvis alian, foje ekflamis kelkaj samtempe, trakrucigante unu alian. Estis kvazaŭ grandioza iluminado. Kaj en la brilo de la ekflamantaj kaj estingigantaj fulmoj ĉiuj konstruaĵoj — la palacoj, la katedralo kaj la Campanile — ricevis vere magian aspekton. Kaj la nuboj sur la ĉielo formis kvazaŭ montaron en la fundo de la urbo.

Bedaŭrinde la fulmotondro alportis pluvon ankaŭ al Venezia, tiel ke la sekvintan tagon oni bezonis ombrelon.

Tamen mi estas plene kontenta pri mia vizito al Venezia. Mi jam timis, ke pro la multaj jam viditaj belaj Venezia ne plu impresus min, precipe ĉar en Dalmacio mi jam havis bonan antaŭguston pri la venezia kulturo, precipe la arkitektura stilo. Preskaŭ ĉiuj preĝejoj kaj sonorilturoj, kiujn mi vidis en Ŝibenik, Split, Dubrovnik kaj aliaj urbetoj kaj vilaĝetoj, estas pli malpli kopioj de la preĝejoj kaj turoj en Venezia. Tamen ĉiuj tiuj urbetoj kaj vilaĝetoj estas nur vasaloj, kaj Venezia estas la reĝino.

Oni povus ĝin en unu rilato kompari kun Nürnberg. Same kiel tiu germana juvelo de mezepoko bonege konservis sian originan karakteron, same tiel ankaŭ la reĝino de Adriatiko konservis la sian. En unu rilato kompreneble Venezia estas tute nekomparebla. Tio estas ĝia situo sur la lagunoj. Oni foje rakontas, ke similaĵo ekzistas en Stockholmo kaj en nederlandaj urboj. Sed mi kredas, ke ili nur malgrandparte

povas reprezenti tion, kio por tuta Venecia estas karakteriza.

Pri Venecia mi povus jam nun skribi tutan volumon, plian volumon plenigus priskribi pri tio, kion mi vidis en la muzeoj, kvankam mi loĝis en tiu urbo nur kelkajn tagojn. Sed la jam dirita sufiĉu.

Esperantistoj sin sentos baldai hejme en Venecia, ĉar ekzistas tie sufiĉe da afablaj gesamideanoj. Esperanto-Domo estas malfermita ĉiusepere, kaj ĉiam vi trovos tie gesamideanojn, kiuj donos al vi praktikajn konsilojn koncerne la urbon kaj la restadon en ĝi aŭ kiuj kun vi promenos kaj interbabilados.

En Venecia estis tre multe da fremduloj, precipe germanoj el la Regno kaj el Aŭstrio. Kaj efektive, se iu urbo meritas esti vizitata kaj admirata, Venecia certe okupas unu el la ĉefaj lokoj.

Mi forlasis Venecia la 12 septembro matene por daŭrigi al Milano.

### Milano.

Italaj fervojoj. — Milano kaj ĝia katedralo.

La italaj fervojoj estas sufiĉe bonaj kaj precizaj. Nur unufoje dum mia vojaĝo tra Italujo mi konstatis malfruigon jam de la elstacio, kiu tamen poste estis parte regajnta. Agrable tuŝis min la surskriboj en la vagonoj. Mi legis ekz.: „E pericoloso sporgersi!“ (Estas danĝere fleksi la korpon tra la fenestro) kaj „E pericoloso aprire la porta primo che il treno sia fermo!“ (Estas danĝere malfermi la pordon antaŭ la halto de l' vagonaro!) En Germanujo oni ĉiam legas: „Verboten!“ (Malpermesite!) Tiu ĉi „estas danĝere“ sonas malpli krude kaj havas la saman efikon.

En Milano mi restis nur kelkajn horojn. Ĝi ŝajnis al mi tre laŭta urbo kun granda trafiko de trajnoj kaj aŭtomobiloj.

Mi nur vizitis la katedralon el blanka marmoro, la plej faman kaj plej belan gotikan katedralon en tuta Italujo, de la milananoj nomitan „la oka mondmiraklo“, kaj supreniris ĝian tegmenton. De ekstere la katedralo ne faras tian imponan impreson, kian oni atendas. Sed se oni eniras ĝin aŭ, ankoraŭ pli, se oni promenas sur ĝia tegmento, oni konvinkigis pri la grandiozezo de tiu konstruaĵo. Preskaŭ du horojn mi restis sur ĝia tegmento.

La tuta katedralo estas admirinda. Nur unu afero min frapis stränge: ke oni starigis statuon de Napoleono inter la sanktuloj (!).

La saman tagon mi forlasis la italian teron, ĉar mia vizo valoris nur por 10 tagoj, kaj antaŭ noktomezo mi devis transiri la limon.

### Luzern.

La veturo de Milano al Luzern kondukis preter Chiasso, tra la tunelo de S-ta Gothardo kaj poste preter Lugano kaj Bellinzona. Sed estis dumnokte, kaj mi ne vidis multe de la bela regiono.

En Luzern mi restis du tagojn. La unuan tagon mi rigardis la urbon kaj faris rondveturadon sur la Lago de la Kvar Kantonoj ĝis Flüelen kaj returne. La dua tagon mi estis en Küssnacht.

Mi intencis resti pli longan tempon en Svisujo; sed la vivkostoj estas nuntempe pli altaj ol en iu ajn alia lando, kiun mi trapasis, kaj mi timis, ke mi ne plu atingus mian hejmon per la mono, kiu ankoraŭ restis al mi.

Efektive, Svisujo estas la plej komforta lando por fremdulo — hoteloj, fervojoj kaj ĉiuj aliaj aranĝoj estas bonegaj — sed nuntempe ĝi estas ankaŭ la plej multekosta lando en Eŭropo. La fremduloj renkontitaj en Luzern estis preskaŭ nur anglaj.

En Luzern mi ne trovis restoracion, kie oni povus tagmanĝi por malpli ol 5 frankoj (inkluzive biero kaj trinkmono); foje mi devis pagi eĉ 8.50 frankojn por unu tagmanĝo. En Venecia mi pagis 40 lirojn (9—10 frankojn) potage por kompleta pensio. En Dubrovnik oni povis ricevi pension por 50—100 dinaroj (3—6 frankoj).

### Ankaŭ la hejmo estas bela.

La hejmlando akceptas min kun sunbrilo. — Freiburg. — Ekskurso en la Nigran Arbaron.

Oni povus kredi, ke post tiom da belegaj viditaj en Dalmacio kaj Italujo la hejmlando ne plu povus entuziasmiĝi min. Estas male.

Dum la lasta nokto en Luzern pluvis torenta, kaj la pluvo daŭris ankoraŭ dum la mateno. Sed kiam mi estis transpasinta la limon — cetere, ankaŭ tie, la pasporta kaj dogana kontrolo estis preskaŭ senĝena — la nuboj estis malaperintaj. La hejmlando akceptis min kun sunbrilo, kvazaŭ ĝi volus prui al mi, ke ne nur la sudo disponas pri luma kaj varmo.

Mi pasigis la nokton en Freiburg en Breisgau (Badeno). Kaj kiam la sekvinta tago mi supreniris la t. n. Kastelmontan kaj vidis la urbon sub mi, kun ĝia katedralo kaj ĝiaj turoj, kaj en la malproksima el ebenaĵo de l' Rejno, mi estis denove ravata de la bela perspektivo.

Posttagmeze mi faris ekskurson en la Nigran Arbaron, tra la „Valo de l' Infero“ al Titi-lago kaj returne.

La germana arbaro estas io, kion mi ofte sopirinta en la sudaj landoj. La germana arbaro estas

io tute senkompara. La palmoj, la cipresoj, la agavoj de Dalmacio estas admirindaj; sed ili ne povas anstataŭi la grandiozajn kverko-, fago- kaj abio-arbarojn de Germanujo.

Kaj la domoj apud la bordo de l' Adriatiko, kiom blankaj kaj sunradiataj ili estas — ĉu ili povas veki fiun hejmeĉan sentimenton kiel la domoj ĉi tie en la Nigra Arbaro kun siaj altaj tegmentoj, foje pli altaj ol la propra konstruaĵo mem?

Kaj la homoj ĉi tie, kvankam ili ne estas tiel viglaj kaj tiel brunhauitaj kiel la sudlandanoj (min, kies vizaĝoj tute brunigis la suno de Dalmacio, oni rigardas jam kvazaŭ fremdulojn), ili ja parolas la saman lingvon kiel, mi. La lingvo estas la plej forta ligilo, la ĉefa signo de kunparteneco. Tial ankaŭ esperantistoj, kvankam diversnacianoj, sentas sin kunpartenantoj, ligataj unu al la alia.

Pro la bela vetero, mi restis ankoraŭ kelkajn tagojn en urbo de la benita Rheingau (fruktoplena regiono apud la Rejno proksime de Wiesbaden). En Horrem mi alvenis nur dimanĉon, la 21 septembro.

### Hejme.

La unua postvojaĝa nokto en la propra lito. — Sono komence terura sed poste dolĉa. — Resumo. — Danko. — Vivu Esperanto!

Mi havas la kutimon multe sonĝi. Kaj en sonoĝo mi ofte denove travivas tion, kio jam pasis, sed en iom strange alligita variece.

La unua nokto en mia propra lito estis por mi same nekutima kiel alie la unua nokto en fremda lito. Pro tio mi ankaŭ sonĝis en la unua nokto post mia reveno al Horrem.

La sonoĝo komencis terure. Mi sonoĝis, ke mi kuŝas en kabanaĉo, sur malseka pajlo, kaj puloj, cimoj, „zanzare“ kaj ĉiaj aliaj bestetoj turmentas min. Kaj apud mia lito sidas sorĉistinaĉo kun plej malbelaj trajtoj, kun longa hoka nazo kaj kun araneaj fingroj, per kiuj ŝi jetas iun bruligan pulveron en mian gorĝon. — Ŝajne estas papriko, kiun la hungaroj tiom ŝatas sed kiun mi en pli granda kvanto ne povas toleri.

Poste aperis leonoj kun teruraj faŭkoj, kiajn mi vidis sur ponto en Budapeŝt; sed ili ne havis langon. Kaj subite staris antaŭ mi ankaŭ la mal-feliĉa majstro, kiu skulptis tiujn leonojn kaj, post fino de la verko, konstatis, ke li forgesis la langojn, kaj pro ĉagreno pri tio mortigis sin.

La leonojn sekvas fiakristroj kaj pakajoportistoj kun grandaj pugnoj kaj minacaj rigardoj. Sed feliĉe jen aperas *Carabinieri* en frako kaj blankaj gantoj. Mi volas voki ilin, sed mia palato estas tute seka; neniuj sonoj eliĝas el mia gorĝo.

Jam la bildo ŝanĝiĝas. Mi ree travivas strangan aferon, kiu okazis al mi dum boat-veturado sur Titi-lago. Apenaŭ mi sidis en la boato kaj ekremis, kiam la boato komencis turniĝi. Mi ne povis kompreni kial. Ĉu la boato estas malbone konstruita aŭ ĉu en la lago estas tiel diablaj akvoturnoj? Fine mi rimarkis, ke unu remilo estas neĝuste alligita. Jen la solvo de l' enigmo! Sed nun en la sonoĝo mi ne povis trovi la solvon. La boato turniĝis kaj turniĝis kaj tute ne ĉesis turniĝi. Helpu Dio, alie mi havos kaputuron kaj marmalsanon!

La turniĝo ĉesas, kaj restas nur iom malagrabla balanciĝado. La boato jen levigas antaŭe kaj mallevigas malantaŭe, jen ĝi faras la malan movigon. Kaj ĉiam, kiam antaŭe ĝi levigas, aperas tabulo kun iu surskribo, kiu tamen je ĉiu nova levigo ŝanĝiĝas. Mirigite mi rigardas tiun kvazaŭ-kinematografan prezentadon.

Unue aperas tabulo kun nombro „XVI“, poste alia kun indiko „Mildolara deficiĉo“, tria portas grandan demandosignon, kvazaŭ ĝi volus demandi: „Kiam komenciĝos la kongreso?“ aŭ „Kie okazos la XVII-a?“ Sur kvara estas desegnita kokoviro „kokokoanta“, kvina montras virinoj forjetantaj monon milionope kaj havas surskribon „La malsparuloj“, sesa portas domojn flimige altajn, tn. nubgrafulojn, kaj la surskribon „Ĝestontujo“\*\*, sepa estas mangokario, kiu rekomendas menuon por 60 000 kronoj, ktp. ktp.

Iom post iom la balanciĝado malforiĝas, fariĝas tute agrabla luliĝado. La sonoĝo rememorigas al mi du epizodojn, kiujn mi travivis sed jam forgesis. — Foje mi vojaĝis kun anglino kaj priskribis al ŝi la belecon de Dalmacio. Sed en mia kapo estis pli da ĉeloj plenigitaj per Esperanto ol per angla lingvo kaj mi rakontis al ŝi tute serioze, ke en Dalmacio ekzistas multe da „bears“ (ursoj), anstataŭ „berries“ (beroj). Kaj ŝi, tute fideme, kredis al mi. Nur poste mi rimarkis mian eraron kaj korektis ĝin. — Alian fojon mi vojaĝis kun germana virino. Jam post la unua rigardo mi volus veti, ke ŝi estas el Köln. Kaj mi estis prava. Ŝi estas tute bonkora virino, edzino de bona kolna burĝo, kiu posedas iun magazenojn. Ŝi havas sufiĉe da mono por vojaĝi, sed mankas al ŝi la instruiteco. Ekzemple, ŝi rakontas i. a., ke hejme ŝi posedas tri pentraĵojn

\*) En unu konsido de la XVI-a iu samideano plendis, ke oni nur „kokokoas“ (t. e. parolas pri KKK) sed ne laboras efektive.

\*\* ) Iu firmo elmontris dum la XVI-a siajn ludilojn, per kiuj oni povus konstrui la „Urbon de l' Estanteco“.

pri Italujo, kiuj estas pentritaj en — akvario (ŝi volis diri „akvarelo“)!)

Mi ridas en la sonoĝo, kiam mi rememoras pri tiu naŭva kolnanino kaj ŝiaj diversaj kuriozaj paroloj, kaj la rido alportas al mi en sonoĝo jam nur ĝoigajn bildojn. Preterpasas la tuta galerio da simpatiaj samideanoj kaj -inoj, kun kiuj mi konatiĝis dum mia vojaĝo. Fine eĉ aperas mia feino, pri kiu mi tiom revis. „Mi volas esti via amikino!“ Kaj ŝi metas sian mildan manon sur mian frunton, por ke mia fantazio trankviligŭ. Mi jam dormas dolĉe, profunde, sensonĝe, senpense.

Nun mi sidas apud mia skribotablo verkante la lastan parton de mia raporto. Mi volas ĝin fari mallonga. Resume mi povas diri, ke mia vojaĝo estis tre bela, tre instrua, tre riĉa je ĉiusepecaj impresoj, kaj ke mi neniel bedaŭras la elspeson de la sumo, kiun ĝi kostis. Preskaŭ ĉie plaĉis al mi tiel bone, ke mi deziras reviziti por pli longa tempo la diversajn lokojn, kiujn mi nur mallonge tuŝis dum tiu ĉi vojaĝo.

Restas al mi ankoraŭ la agrabla devo, danki al la gesamideanoj en la diversaj landoj kaj lokoj, kiuj helpis min kiom ajn. Mi ne povas citi la unuopajn nomojn, sed mi petas ĉiun kontentiĝi per tiu ĉi ĝenerala dankesprimio.

Jes, karaj gesamideanoj, dank' al vi kaj dank' al nia Esperanto mi preskaŭ ne sentis la nevit-eblajn malagrablaĵojn de la vojaĝo, tiel ke restas preskaŭ nur tre agrablaj rememoroj!

Do, vivu la esperantistaro, vivu la bela samideana sento — la „nova sento“, pri kiu kantis nia majstro —, vivu Esperanto!

### Postparolo.

Perdiĝinta manuskripto. — Zagreb kiel urbo de U.K. — Preseraroj ktp. — Nenio en la mondo estas perfekta.

Bedaŭrinde mia raporto ne estas tute kompleta. Perdiĝis survoje manuskripto, kiun mi sendis el Zagreb (Agram) kaj kiu priskribis mian restadon en la metropolo de Kroatioj.

Estus sencela nun ripeti ĉion, kion mi raportis pri Zagreb, kiam miaj impresoj estis ankoraŭ tute freŝaj. Mi nur diru, ke ankaŭ Zagreb estas vidinda urbo: la vivplena „Illica“ (ĉefa komerca strato), la foiro sur „Jelačić-trg“ (ĉefa placo), la vespera promenejo sur „Zrinjevac“ aŭ „Zrinski-trg“ (larĝa parksimila bulvarado kondukanta de la stacidomo al la interna urbo), la rigardo de la „supra“ urbo parto al la „malsupra“ kun ĝiaj preĝejoj, palacoj kaj domoj.

Mi aŭdis de la zagrebaj samideanoj, ke ili intencas inviti iun venontan Universalan Kongreson al sia urbo. Tiu ideo ne estas malbona. Zagreb estas kultura centro de Jugoslavio, kaj Universalna Kongreso en Zagreb havus grandan efikon sur la tutan Balkanon. Cetere Zagreb mem estas ankoraŭ tute eŭropa, kvankam ne tre granda urbo.

Mi iom timas pri la taŭga loĝigo de kelkmiloj da kongresanoj. Sed la zagrebaj samideanoj certigis min, ke en okazo de bezono oni povos nepre prizorgi sufiĉe da puraj loĝejoj, kaj ke ankaŭ kelkaj grandaj modernaj hotelejoj estas konstruitaj, el kiuj unu tuj apud la stacidomo — kiel mi poste mem konvinkiĝis — jam estas preskaŭ finita. La urbo mem estas bele situanta ĉe la rando de montaro Sljeme.

Krom Zagreb ekzistas ankoraŭ tri simile grandaj urboj en Jugoslavio: la politika centro Beograd, kiu tamen por multaj motivoj provizore ne estas konsiderinda kiel urbo de U.K., Sarajevo, la ĉefurbo de Bosnio kun tute orienta karaktero, kaj la nun malmulte signifa urbo Sabotica (jama Sabadka aŭ Maria-Theresiopol). Do se oni emas foje okazigi Universalan Kongreson en Jugoslavio, ĝi povus certe okazi nur en Zagreb.

— Kelkaj legatoj de ET dum mia vojaĝo atentigis min je diversaj preseraroj trovigitaj en mia raporto. Mi mem nun ree tralegis ĝin; sed la preseraroj ŝajnas al mi ne tiel gravaj, ke ili malklarigas aŭ eĉ ŝanĝas la sencon; tial mi rezignas je korekto. Estas tute neeble eviti preserarojn; eĉ la plej lerta korektisto ne povas trovi ĉiujn.

Pleue oni atentigis min, ke en Adriatiko ne ekzistas delfenoj. Do, la saltantaj fiŝoj, kiujn mi vidis tie, devas esti de alia speco. Sed mi ne estas la sola, kiu parolis pri delfenoj; preskaŭ la tuta pasaĝeraro kredis vidi delfenojn.

Kelkaj hungaroj ne ŝafis, kion mi skribis pri ilia lingvo. Sed mi atentigas ilin, ke mia raporto estas tute individua. Hungara lingvo fakte sonas al miaj oreloj fremde, stränge, barbare; tamen ĝi havis por mi tute apartan ĉarmon, kiel mi ankaŭ skribis en mia raporto. Kompreneble hungaraj povus same opinii pri germana aŭ angla lingvo, ke al iliaj oreloj ĝi sonas barbare.

Fakta eraro troviĝas en la piednoto sur n-o 209, pĝ. 2, kol. 1. Krom la tie cititaj eksterlandanoj partoprenis la sudslavan kongreson ankoraŭ du danziganoj (fratoj Felhke) kaj unu polo (s-o Sakowicz).

Se mia raporto enhavas ankoraŭ aliajn, faktajn erarojn, mi estus dankema, se oni bonvolus sendi korekton. Neniu kaj nenio en la mondo estas perfekta.

Kaj nun mi finas. Teo Jung

## Alvokoj.

### Bonvolu sendi gvidlibrojn, gvidfoliojn ktp. al Wiesbaden.

La 18 kaj 19 oktobro okazos en Wiesbaden la ĉefkunveno de la „Rejna Trafik-Sindikato Godesberg“ (Rheinischer Verkehrsverband Godesberg). Estas intencata, fari paroladon pri „Esperanto kaj trafiko“ dum la kunveno kaj aranĝi ekspozicion. La subskribinta grupo petas la absendon de gvidlibroj, gvidfolioj kaj de ĉiuj presaĵoj, kiuj koncernas la trafikon. Ĉiu sendonto per tio utilos al si mem kaj al sia urbo, firmo ktp.

Esperanto-Grupo Wiesbaden (Germanujo)  
Emserstr. 58.

(Nepre rekomendata de la Redakcio.)

### Foiroj, ekspozicioj, reklamemuloj ktp.

Mi sukcesis kontraktigi kun la ĉi-loka trafika societo la elpendigon de afiŝoj, reklamoj ktp. de Esperanto-entreprenoj, ekspozicioj, foiroj, komercistoj ktp. en montrofeneŝtro de la nomita societo. Mi do rekomendas al ĉiuj interesatoj sendi al mi senpage sian materialon por elpendigado. Adreso:

Walter Weber, Del. UEA, Erfurt  
Gust. Adolfstr. 1. (Tel. 885)

### Esperanta propagando.

Por akceladi la praktikan aplikon de Esperanto en la mezo de la Ruhrdistrikto en Bochum, ni establis „Esperanto Servon“. Ni do petas ĉiujn gesamideanojn, sendi al ni malgrandajn informojn ĉiusepacajn, kiuj povos interesi la legantojn de nia nacilingva gazetaro. Ni tradukos ĉi tiujn informojn kaj la gazetoj nur rajtos represi ilin sub la surskribo „Esperanto-Servo“. Se la gesamideanoj kunlaboros kaj helpos nin, ni ne prilabos niajn esp. gazetojn, sed faros bonan propagandon por Esperanto. Se nia provo sukcesos, ni plibonigos kaj pligrandigos la „Esperanto Servon“. Do, gesamideanoj kaj speciale vi, delegitoj de UEA., helpu nin sendante taŭgajn informojn ĉiusepacajn al la suba adreson.

D-o Wullen,

Westfälische Str. 29, Bochum, Germanujo.

### Al la partoprenintoj de la II-a Sudslava Esperanto Kongreso.

La subskribinta prezidantaro de la II-a Sudslava Kongreso en Split kore petas ĉiujn eksterlandajn partoprenintojn de nia bela manifestacio sur la orienta marbordo de Adriatiko bonvole sendi siajn impresojn pri Split kaj Dalmacio al la sube signita prezidantaro. Ni intencas kolekti la impresojn de ĉiuj fremdlandanoj, kiuj jam vizitis nian landon, kaj uzi ilin por la reklamo de nia lando eksterlanden.

Samtempe ni petas tiujn gesamideanojn, kiuj partoprenis la komunan promenadon ĝis la pinto de Marjan, de kie ili ĝuis la neforgeseblajn perspektivojn sur la insuloj kaj la maro, esprimi siajn dankesentojn al s-o D-o Jakša Račić, la senlaca iniciatinto de la grandioza promenadŝtuparoj kaj platkonstruaĵoj, kiu mem havis la afablecon gvidi nin supren.

Refoje dankante al ĉiuj ĉeestintoj de nia II-a ni certigas ilin, ke ili pli valoris por la propagando de nia sankta ideo ol cento da paroladoj aŭ artikoloj. La fruktoj baldaŭ videbligos kaj ni ne mankos priskribi ilin ĉi tie en nia ET, kiu tre multe faris por ni kaj sendis al nia II-a sian bravan ĉefredaktoran s-on Teo Jung.

Por la prezidantaro de la II-a Sudslava  
R. Rupčić, Palmirina 9, Split.

### Al esperantaj societoj, redakcioj kaj ĉiuj favoraj esperantistoj.

Celante pli disvastigi lingvon Esperanto en malproksima urbo Zajtka (Norda Rusujo), mi petegas subteni propagandon de nia kara lingvo per sendo de nebezonaĵaj fotografajoj de naciaj kongresoj, ekskursoj; gazetoj, poŝtkartoj kun esperanta surskribo k. c. por okazigi ĉi-tie propagandan esperantan ekspozicion. La esperantistoj ne resendotaj. Helpu la movadon! Sendu petatajn propagandilojn laŭ adreso: A. Alalikin, ulica Urickij, domo 14, Vajtka, Ruslando. Akceptu antaŭan dankon!

## Listo

### de literaturaj manuskriptoj

alvenintaj depost 15 julio ĝis 30 septembro 1924.

Vidu ankaŭ niajn listojn en ET n-oj 201 kaj 202!

(Konsilo al verkantoj: Skribu nur sur unu flanko de l' papero, lasu marĝenon sur ĉiu paĝo, skribu legeble, se eble per maŝino, nepre evitu nenaturan skribon (f. n. „spugulan skribon“ k. s.)) Por la baldata publikigo de manuskriptoj estas decidita ne sole la enhavo kaj stilo, sed ankaŭ la legebla skribo de manuskripto, ĉar nia literatura redaktoro havas nur malfacile la tempon por kopii malbone legeblajn manuskriptojn.)

### 1. Presotaj.

Amuzajoj (I.V.) 135 (parte).

Ĉe l' fakiro 140 a.

Humorajoj (Dr. Fr.) 146 (parte), Humorajoj (K. T.)

147 (parte).

Kanto de kondamnitto 158, Kelkaj postuloj 130 g.  
Laborista studento 152 c, La hundo 143, La kaverna de Steenfol 132, La klerulo kaj la rabisto 162 a, La pantalono 160, La sportduelo 155

Maksimoj 162 b.

Neharmonieco 148, Nun 130 f.

Rokoko-serenado 155.

Sekreta skribaĵeto 130 b, Se mi estus 131 c,  
Somera nokto 133.

Venu 130 e, Vespero (Kap. B.) 142.

### 2. Eventuale presotaj.

Ĉe la Rejno 134 a.

Du kredoj 156.

Elpensu ion alian! 150 c, En malfrua nokto 157 a.

Feliĉo 137 b.

Cramatika eraro ĉe Fritz Reüter 161.

Kiam la homoj sciis la horon de sia morto 137.

Labormanko 130 h, La naturo 159, La plej malriĉulo 152 a, La sorbfolio 152 b, La ursido 145.

Saluto al Kolonjo 139 b, Signo de l' tempo 149.

### 3. Ne presotaj.

Bligger le Fléau 130 a, Bonĉjo Silent 140 b.

Ĉu l' koro povas esti gaja? 131 h.

En remparo 154 (malfacile legebla), Espero 131 e.

Flugo, nova sento! 131 b.

Kiel aglo 151.

La alkoĉiga vinberujo 164, La malbeno 130 d,

La tempo kuras (W. W.) 134.

Mateniĝo 131 f.

Okulvitroj 141.

Pluvo 131 g.

Saluto al XVI-a 131 a.

Verda Stelo 131 d, Versaĵoj (G. S. en T.) 136.

*Ĉe demandoj pri manuskriptoj oni ĉiam indiku la numeron! Manuskriptojn ni resendas nur, se estas aldonita afrankaĵo.*

*Ĉiu verkinto de manuskripto aperinta rajtas postuli kelkajn senpagajn aŭtor-ekzemplerojn de la koncerna numero de „Revuo“.*

*Verkintoj de manuskriptoj nepresotaj laŭ ET n-o 201 bonvolu sciigi nin tuj, ĉu ili deziras resendon, indikante la registran numeron kaj aldonante validan respond-kuponon aŭ monbileton sufiĉan por la resendado kaj ankaŭ sian novan precizan adreson. Post 31 oktobro ni bruligos la ĝis tiam ne repostulitajn manuskriptojn nepresotajn (laŭ ET n-o 201).*

## UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

12, Boulevard du Théâtre, Genève (Svislando).

### CELO:

Disvastigi la uzadon de la helplingvo Esperanto.

Plifaciligi la ĉiusepacajn moralajn kaj materialajn rilatojn inter la homoj sen diferenco pri raso, nacieco, religio aŭ lingvo.

Krei internaciajn servojn uzebajn de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materialaj interesoj celas trans la limoj de ilia genta aŭ lingva teritorio.

Kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolviĝi ĉe ili la komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj.

### SERVOJ:

Ĉiu membro ricevas membrokarton, jarlibron kun la adresaro de la Delegitoj kaj multaj informoj pri la movado; li rajtas uzi la helpon de la Delegitoj, difinitan laŭ la statuto.

### ALIGO:

La kotizo por membro estas 5 fl., por membro-abonanto 12,50 fl. svisa valoro. Rekomendinda estas la aligo kiel membro-abonanto, kiu ricevas la gazeton „Esperanto“ dum jura jaro. Pro la kurzdiferenco speciala prezo por malbonvalutaj landoj.

## Rus-lingvanoj, atentu!

Kazana Filio de Sovetlanda Esperanista Unuigo komencis eldonadon de lerno, titolita

## „Esperanto hejme“

Gazeto-lernolibro.

Nova metodo de lernado de Esperanto. Redaktata de *Salavin, Frank, Smirnov kaj Lidin*. Resp. redaktoro Lidin.

12 numeroj — 72 lecionoj.

Abonkondiĉoj: 5 rubloj por tuta kurso.

Rabataĵa abonprezoj:

por ruĝarmeanoj	1 r 15 kop.
por lernantoj	2 r 15 kop.
por laboristoj kaj kamparanoj	2 r 50 kop.
por oficistoj	3 r — kop.

Detalaj prospektoj estas liverataj por 10 kop.

Adreso de redakcio kaj administracio de „Gazeto-lernolibro — Esperanto hejme“

**Kazanj**, Tataria Respubliko, Ĉerniŝevskaja 8.

## Babiladoj

de Bonhumora Zamenhofano de Joŝo

## reaperis

en dua eldono.

Prezo: 0,50 germ. mk.

Mendu ĝin tuj en via Esp. librejo aŭ ĉe

Eldonejo J. Ŝapiro

Lipova 33, Bialystok (Polujo).

## Anoncetoj.

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskigo, fianĉigo, edziĝo, morto, okazontaj gravaj esp. kunveno, festoj k. s.) senpage. Aliaj anoncetoj, nur akcepteblaj por minimume du silnekvaj espritoj, kostas po da espritoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de ok ET-numeroj kontraŭ antaŭa pago. Abonantoj ĉe kiuj ni povas deok ET-numeroj kontraŭ antaŭa pago. Abonantoj ĉe kiuj ni povas deok ET-numeroj kontraŭ antaŭa pago, gias por propra anoncetoj preferen preniti la pagon de la abonkoto. Germanoj pagas 2 — mk., prefera prezo por postabonantoj 1,25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

NASKIĜO Geedzoj Paŭlo kaj Natalia Zajkovskoj el Ŝostka (Ukrainio) kun ĝojo scigas, ke naskiĝis fiŝto, nomita Sergio. [1]

S-O DALTIS DRAUT EN PRAHA II, skribinta al ni, estas petata tuj informi nin pri sia adreso kaj la teksto por la anonceto, mankintaj en letero. Adm. de ET. [1]

KOREKTO. S-o J. Zakrewski en Warszawa ne nomigas kiel anoncie en ET 205 Lakrewski sed Zakrewski. Lia adreso estas Wilenska 41—21, Warszawa, Polujo. [1]

ADRES-SANGO. Al mia Esperanto-amikaro mi scigas, ke mi denove transloĝiĝis al Łódź, kie mia adreso estas: Izrael Leizerowicz, Kilinskiego 30, Łódź, Polujo. [1]

AL KOLEKTANTOJ. Mi atentigas, ke mi ne estas reprezentanto de Internacia Interŝanklubo „Amikeco“ por Rusio. Logiko de mia nomo en listo de reprezentantoj bazigas sur erarkompreneo. H. Frank, Kazanj. [1]

KIU VOLAS HELPI MIAN PREĜEJON, kiu estas restarigota, sed neniam havas da mono, mi apelacias al la bona koro esperantista. Adreso: Pastro L. Sonnenfeld, Wenigzell, Stirio (Aŭstrio). [2]

LA SVEDA SAMIDEANO, kiu sendis al mi revuon „Allt för Alla“ kaj „Vårt Hem“ estas petata bonvole skribi al mi sian adreson, por ke mi povu al li resendi laŭ liaj deziroj. L. A. De Greef, 28 rue des Hayettes, Lodinensart (Belgijo). [2]

KURSGVIDANTOJ! Por diversprofesiaj gekursanoj mi serĉas gekorespondantojn. Bela Spitzer, del. de UEA., Subotica, Jugoslavio. [2]

GRANDEGA PETO. Kiu rusa samideano scias ion pri la sorto de mia edzo Henry Meinig, militkapitula 24.12.1924 apud Involvdz (Polujo). Tregege mi petas sciintojn al s-ino Klara Meinig, Chemnitz, Freigutstr. 22, Saksujo (Germanujo). [2]

MONTECATINI (Italujo). La du gesamideanoj, kiuj alvenis al Montecatini, la 14 aŭgusto matene, el la Vienna Kongreso, kaj kiujn mi ne povis plu revidi, post nia momenta renkonto en la stadomado, estas petataj ĝentile sendi al mi siajn adresojn. S-o Ceserini Fidia, del. de UEA, Potenza (Italujo). [1]

LA ESPERANTA GRUPO „MOJSIJE PAIC“ EN ZEMUN (Jugoslavio) vendas „La trezoro de l' orafisto“ de August Senoa, historia romano el XVI jarcento. El kroata lingvo tradukis Fran Kolar-Krom. — La libro estas 290-paĝa, kun portreto de la aŭtoro, broŝurita, formato 15x20, papero bonega, eldonita en la jaro 1911, rekomendita de Kabe. Ĝi estas unu el la plejbonaj kroataj romanoj. La prezo estas nur 45 dinaroj aŭ 3 sv. flk. Adresoj por mendoj estas la grupo mem. [2]

LETERVESPERO. La Esperanta grupo „Amikaro“ en Langenau apud B.-Leipa, Ĉeĥoslovakio, aranĝos la 6 oktobro propagand-kaj letervesperon. Gesamideanoj el la tuta mondo estas kore petataj, sendi il. PK kun bl. afr. Laŭ deziro niaj korespondemuloj danke rekomencos sammaniere al ĉiu sendinto. [2]

### Korespondo kaj Interŝango.

S-o Paŭlo Avedvin, Saratov, poŝte restante, Rusujo, deziras korespondadi kun tiujlandaj samideanoj. Interŝangas ankaŭ PM. Ĉiam respondos. [2]

F-ino Mary Hendriks, 20-jara, Kanaalweg 30, Utrecht, Nederlando, deziras korespondi kun ĉiuj landoj kaj precipe interŝangi PM kaj vidkartojn. [2]

Per bela il. PK mi ĉiam respondas al ĉiuj, kiuj sendas al mi il. PK flatelie afrankita. „Pacamo“, 5 rue de la Savonnerie, Perpigjan, Francujo. [2]

S-o Jordan Stojčev, fraŭlo, ul. Makedonska 102, Varna, Bu garujo, deziras korespondi per L kaj il. PK. Interŝangas esperantajn librojn, il. gazetojn kun ĉiujlandojn. Certa respondo. [2]

H. Van der Mast, Lange Van Ruisbroeckstr. 36, Antwerpen (Belgijo) deziras interŝangi nedifekciajn PM kun ĉiuj landoj (krom Germanujo, Aŭstrio, Polujo, Hungarujo). Ne bagatelajojn. Interŝangas ankaŭ grandkvante. [2]

M. Schepens, Jan Davidlei 43/5, Antwerpen-Kiel (Belgijo), deziras interŝangi PM kun ĉiuj landoj. [2]

S-o Nikolaj Wiremiecko, pocz. Snow, pow. Niŝevskij, folw. Tarejki, Polujo, Interŝangas il. PK kun interesaj vidindajoj kun amikoj ĉiulandaj. Mi certe respondas ĉiujn skribaĵojn. [2]

S-o ing. Otto Schwarz, Teplitzstr. 26, Aussig a. Elbe, Ĉeĥoslovakio, deziras interŝangi il. PK kaj korespondadi per il. PK (nur vidaĵoj) kaj pri teknikaj temoj. Certe respondos. [2]

La 25 novaj esperantistoj deziras eksterlandajn korespondantojn. Adreso: S-ano Leon Ringler, „Premier“, Boryslaw, Polujo. [2]

S-o Jozfo Siegmann, „Premier“, Boryslaw, Polujo, deziras interŝangi PM (minimumo po unu serio) kun orientanoj, afrikanoj, afrikaj insuanoj kaj kun amerikanoj. Interŝangas mi sendas europajn. [2]

Kolporisto deziras korespondi je fakaj temoj. Adreso: Joano Harasym, Lwów, strato de Bilinskich 58, Polujo. [2]